

ORIENTA KURTIERO

者 使 東 遠

ENHAVO

“Infan-Kolonio”	Tsai Yan
Ĉinio batalas ankaŭ por vi!	Sung Mej-ling
Episkopo Paul Yu Pin	Elpin
Spertoj en “Daj Nippon”	V. K. Trifonoff
La ĉina skolta servo dum la milito	Kaŭ Jung
Fremdaj koncesioj en Sanghaj	Tsai Yan
La batalintoj parolas al vi	El “Internaciisto”
La transformiĝo de ĉina kampara ekonomio	Sun Sjo Ĉun
Geografiaj faktoroj en Malproksima Oriento	Tsai Yan
Onklinoj kaj gekuzoj (novelo)	Elpin
Kiom kostis la bombardado de Ĉungking al Japanujo?	El China Weekly Review

ORIENTA KURIERO

MONATA ILUSTRITA REVUO.
HONG KONG. P. O. BOX No. 10.

ENHAVO		Paĝo
“ Infan-Kolonio ”	Tsai Yan	1
Cinio batalas ankaŭ por vi!	Sung Mej-ling	3
Episkopo Paul Yu Pin	Elpin	6
Spertoj en “ Daj Nippon ”	V. K. Trifonoff	7
La ĉina skolta servo dum la milito	Kaŭ Jung	9
Fremdaj koncesioj en Sanghaj	Tsai Yan	15
La batalintoj parolas al vi	El “ Internaciisto ”	22
La transformiĝo de ĉina kampara ekonomio	Sun Sjo Cun	25
Geografiaj faktoroj en Malproksima Oriento	Tsai Yan	28
Onklinoj kaj gekuzoj (novelo)	Elpin	35
Kiom kostis la bombardo de Cingking al Japanujo?	El China Weekly Review	42

ATENTU LA NOVAJN ABONPREZOJN!

Jara abono kostas de januaro 1939
4 anglajn ŝilingojn aŭ
1 usonan dolaron aŭ
egalvaloron en aliaj landoj.
1 ekzemplero kostas 10 cendojn usonajn.
Specimeno sendota kontraŭ unu respondkupono.

ORIENTA KURIERO

Dua Jaro

Junio, 1939

Sesa Numero (14)

“INFAN-KOLONIO”

Tsai Yan

“La okazantaĵoj en Eŭropo entute fortiras la atenton je tio, kio okazas en la Fora Oriento. Dum baldaŭ du jaroj furiozas tie “konflikto”; signo de hontemo eble estas la evito de l’ vorto “milito.” Informo pri bombardado de iu ĉina urbo, kies nomon ni apenaŭ kapablas reteni, kaj kelkmil viktimoj ne povas impresi nin pli longe, ol daŭras la komuniko. Jam tiom nin okupas la apuda, la pli proksima propra sorto.”

Per la cititaj frazoj komencaĝas la gvidartikolo de la maja numero de “Esperanto.” Kiel veraĵ vortoj! Kiel ekzakta observo! Tamen, ni ne malesperas, tamen ni ne perdas kuraĝon. En la nokto ĉiam aperas ie kaj tie radioj de l’ krepusko, tra la senluma estanto ekbrilas la promesa lumo de l’ pli hela estonto, kaj donas al ni kuraĝon por daŭrigi la batalon, kontraŭstari la malamikon—ne nur nian, sed tiun de la tutmonda libereco—kaj venki, venki! Vane

estas tiel laŭtaj la suspektcelaj potencoj antaŭ la forumo de l’ monda publiko, vane ili pugnigas la manon kaj minacas per subpremo la liberecon sopirantan homan rason! Prudento, inteligento kaj la nesufokebla deziro, volo kaj postulo al justeco triumfos!

Jen ekzemplo! Sur la landlimo de Nederlando defendprete gardostaras holandaj soldatoj, pretiĝis jam delonge por la konservo de sia libereco kaj sendependeco. Sama danĝero minacas la malgrandan Belgujon, kaj tamen, tamen estas tie homoj, samideanoj kaj kamaradoj, kiuj trans iliaj zorgoj, konsciante la ĉiumomente eksplodeblan militon, laboras por komunaj celoj, por idealoj, por la estonto!

K-do Marc Delforge, nia “Homarano” faris projekton siatempe pri la kreo de “Infankolonio,” celanta la savon de kelkaj senkulpaj viktimoj de perforto en Hispanujo, Ĉinujo kaj Germanujo. Komenciĝis

varbado kaj monkolekto por havigi la necesan fonduson kaj jam kuniĝis 700 b.f. La plano en tia formo tamen ne sukcesis, ĉar intertempe Hispanujo estis venkita kaj la sendo de ĉinaj infanoj estus kostinta tro multe. Pro tio K-do Delforge skribis al ni kaj "Voĉoj el Oriento" interalie: "Mi akceptus, se la aliaj kunlaborantoj de nia entrepreno konsentas, ŝanĝi ĝin jene: mi sendus al s-ino Ĉjang Kaj-ŝek aŭ al la estraro de iu orfejo en Ĉinio, la tutan kolektitan monon sub la kondiĉo, ke oni instruu esperanton kiel duan lingvon al unu klaso almenaŭ de niaj protektotoj... Ankaŭ mi ne kontraŭus se la afero okazus en Hong Kong kaj ke vi zorgu por esperantistigi 20 infanojn.

"Laŭ la pespektivo, kiun donas al mi la jam ricevitaj monoj kaj enkalkulante la fakton, ke ĝis nun ni povis organizi la kolektadon nur en Francio kaj Belgio, ni kredas ke iom laborante, ni povos kolekti por la dirita celo 600 b.f. ĉiumonate (proksimume 4,2 aŭ 4,3 sterlingajn librojn).

"Mi pretas eldonigi grandan nombron de markoj por tiu internacia helpo, mi kontroligos mian finanĉan agadon de kelkaj membroj de la grupo de Charleroi aŭ se la markoj eldoniĝos en Bruselo, mi kontroligos de membroj de la Brusela grupo.

"Sugestoj de la kamaradoj kaj ĉefe de la donacintoj estas atentataj kaj estos bonvole atentataj. Ili nepre ricevos respondon.

"Represis mian unuan alvokon kaj aperigis duan artikolon "Infanoj sur Tutmondo," represis mian alvokon "Voĉoj el Oriento," "Orienta Kuriero," "La Semanto," Svisio, *Bern*, Neufeldstrato 13, "Ruĝa signalo," H. Banerth, Nederlando, Roterdamo, Marentakstr. 24, "Lumturo de Esperanto," Francio.

"Danke ni kvitancas la sumojn al la donacintoj ĝis nun konataj en la nomo de nia organizo:

J. Wesler, Le Lannou Plougevin	(Francio)	20 fr.	fr.
R. Renard (jan. feb.)	"	85	"
Gek-doj Brun Lefraiardel	"	20	"
Franca G. E. E. ...	"	100	"
Esp-ista grupo de Bourges	"	30	"
Bourguignon, Bessur-Issole	"	50	"
Grupo de Toulouse (s-ro Laffon)	"	40	"
Jean Pierard	Belgio	15 b.	"
A. Lejeune por "Libera Stelo"	"	50	"
Laborista grupo de Charleroi	"	30	"
Delforge, Charleroi	"	200	"
" kolektis dum Belga FET kunveno	"	100	"
A. Pirotte, Ougree	"	5	"
Internacia sekretario de la entrepreno kaj peranto por mono en Belgio:			
<i>Marc Delforge</i> , 33 rue de Heigne, Charleroi , Bel-			

ĈINIO BATALAS ANKAŬ POR VI!

Radioparolado de *Sung Mej-ling*

“La detruigo de Ĉinujo en la celado por sukcese daŭrigi la reziston, ĝis la invadinto estos fine forpelata el ĉina teritorio, signifus minacon al la tuta demokrata mondo—minacon, kiu endanĝerigus unue la stabilecon kaj sekurecon de Aŭstralio kaj poste envolvus ĉiun pacan landon en katastrofon,” diris sinjorino Ĉjang Kaj-ŝek en ŝia radioparolado el Ĉungking al la popolo de Aŭstralio. Ĉi sube ni donas la plenan tekston de la parolado.

“Mi transsendu la salutojn de l’ ĉina popolo al vi ĉiuj, kiuj

vivas en la floranta, paca lando de Aŭstralio kaj al ĉiuj aŭskultantoj.

“Mi parolas el tragika loko. Min ĉirkaŭas nur fumantaj ruinoj, kie antaŭ kelkaj tagoj estis prosperaj partoj de l’ dense loĝata urbo.

“Aeratakoj disvastigas la ruinojn kaj morton tra tuta Ĉinujo, sed ili neniam rezultas malvenkon.

“De la nordo ĝis sudo de Ĉinujo, de la marbordoj ĝis fora okcidento nia lando lumiĝas per la fajro de niaj hejmoj kaj entreprenoj, kaj la senĉesaj, agoniaj krioj de l’ mortantoj torturas la

gio. (poŝtĉekkonto n-o 1991.06)

Perantino por mono en ĉiuj aliaj landoj:

K-ino R. Renard, 5 rue du Boulanger, **Honfleur**, Calvalos, Francio. (poŝtĉekkonto: Rouen n-o c/c 303 82)

Franca sekretario:

K-do Bourguignon, red. de Infanoj sur Tutmondo, **Besse-sur-Issole**, (Var) Francio.

“Perantoj en diversaj landoj estas petataj (oni laboras senpage).”

Ni ankoraŭ aldonu al la rimarkoj de k-do Delforge, ke laŭ lia informo ni faris la necesajn aran-

ĝojn kaj ricevis klarigon de l’ oficialaj instancoj ĉi tie en Hong Kong, ke principe *estas neniam malhelpo por la realigo de la tuta plano, kaj instruo de Esperanto al infanoj* en la orfejo. Nun estas la vico de niaj tutmondaj amikoj, kiuj ankaŭ ĝis nun multe helpis same al ni, kiel al nia movado en Ĉinujo. Por eviti miskomprenon, ni devas noti ĉi tie, ke la artikolo pri “Infankolonio” en “Voĉoj el Oriento,” aperis pli frue ol nin trafis la oficiala informo.

senfinan firmamenton. Ĉiun tagon, kiam la suno brilas aŭ eĉ sinkaŝas kvazaŭ honteme, japanaj bombmaŝinoj vagas longe-larĝe kun senkompata intenco: krei novajn incendiojn.

“Antaŭ la okuloj de la mondo ili ĉiutage faras brulajn oferojn al Marso per ĉinaj viroj, virinoj kaj infanoj.

“Mi vidis la bombadon de l' ĉinaj urboj; mi veturis dum tagoj sur kaj tra la vojoj de ruinoj. Mi vidis senfinajn vicojn de nia popolo, frapita, penanta kaj baraktanta sur la montojn por trovi rifuĝon kaj sekurecon. Poste mi aŭdis, kiel ili estis malvarmsange murditaj de la maŝinfilaj kugloj de l' japanaj aeroplanoj.

“Nun, dum mi parolas, mi ankoraŭ sentas la haladzon de l' bombardita Ĉungking, kiu estas mil kvarcent mejlojn for de la marbordo, supre ĉe la Jang-ce rivero. Ĉi tie okazis sangsoifa amasmurdado kaj tiaskala bruigo, kion oni neniam spertis. Mi deziras, ke neniu alia urbo havu samajn spertojn.

La japanoj aplombe asertas al la mondo, ke ili devis tion fari kaj ili ankoraŭ faros saman buĉadon. Dum mallongaj momentoj ili kreis Golgoton el la plej homplena urbo de la mondo.

“Malgraŭ ĉio, tiu tremiga triumfo estas nur ripeto de

teroro, kiun la japanoj faris en multege da aliaj urboj. Tio estas parto de ili planita politiko por dezertigi Ĉinion kaj senmoraligi nian popolon.

“Tamen ili vane klopodis dum dudek-du monatoj sub ilia konata devizo, “bati ĝis Ĉinujo genuos.” Ilia senbrida kaj kruelega barbarismo, malhumana intenco tremigis la tutan homaron.

“Ili blokadas nian marbordon de nordo ĝis la sudo. Ili ruinigas nian landon per ilia milita maŝinaro, kiun ili ĝis nun kredas nevenkebla. Sed ili ankoraŭ ne venkis nin, kaj neniam ili sukcesos eĉ kiel ajn longe ili daŭrigu la teroron super niaj malbone protektataj kapoj.

“Ili ne povas nin venki, ĉar ni estas agrikultura lando, kiu nenie havas koncentrigitajn riĉaĵojn detruoblajn, kies perdo kripligus kaj submetigus nin al la sovaĝa kaj pli bone armita malamiko.

“Ili ne povas nin venki, ĉar ni batalas por nia fekunda tero, por nia suvereneco kaj libero, same kiel vi batalos por via, dum nia lando superŝutiĝas per la fluanta sango de nia popolo.

“Jen estas grava leciono al vi en Aŭstralio, kiuj aŭskultas min. Ni ne havas eĉ unu facile detruoblan centron en nia tuta vasta lando, sed viaj riĉaĵoj estas kolektitaj en marbordaj

metropoloj kaj kelkaj internaj centroj.

“La blokado kaj parto de tia bombardo, kion ni suferis de tiel sovaĝa malamiko, kia estas Japanujo, devigus vin cedi.

“Ni komencis la reziston kun 470 milionoj da homoj, dum via loĝantaro nombras malpli ol $7\frac{1}{2}$ milionojn. Tiun ciferon multe superas la nombro de tiuj personoj en nia lando, kiuj forlasis siajn hejmon kaj entreprenon pro la aeratakoj.

“Kio povas savi Aŭstralion kaj la loĝantojn de l' Sudmaraj Insuloj, se Ĉinujo fiaskus en sia rezisto kaj Japanio akirus al si nian vastan landon kiel parton de l' Azia Imperio, pri kio ĝi revadas? Fariĝu kia ajn la eŭropa stato, nenia militŝiparo povas helpi Aŭstralion, se Japanio uzas la najbarajn insulojn por siaj militoperacioj. La popolo de Aŭstralio kun sia malgranda loĝantaro ne povos frakasi la japanan invadon kion ĝi povas ekirigi, plifortigita per la naturaj trezoroj de l' konkerita Ĉinio. Ĉu vi rekonas la gravecon de tia ebleco? Ĉu vi, sur viaj pacaj paŝtejoj, perceptas la signifon de tio, kio reale okazas ĉi tie, ĉe la norda pordego de via lando? Ĉu vi, en minejaj regionoj kaj en la urboj, ĉu vi scias, kiajn konsekvencojn portos al Aŭstralio la kolapsinta kaj venkita Ĉinujo?

“Estas nur sola rezulto: se Ĉinujo ne eltenas en sia rezisto, ne sukcesas forpeli la invadantojn, tio signifas minacon kontraŭ la tuta demokrata mondo, sed unuavice kontraŭ Aŭstralio.

“La konkero de Ĉinujo ne kontentigos Japanion. Se ĝia preteksto estus honesta, t.e. ke ĝi devas havi landon por sia kreskanta loĝantaro, tio ne estas solvebla en Ĉinio. Ĉiu peco de kulturebla tero estas ekspluatata kaj prilaborata de nia popolo. En tiu ĉi provinco, en Seĉuan, oni terasigis ĉiujn montetojn por laŭebla kulturado. Japanio bone konas la situacion. Ĝi bezonas en Ĉinio bazon sur la kontinento por ĝia imperio kaj la naturajn fontojn de nia lando.

“Japanio devas serĉi aliloke neokupatajn teritoriojn por sia popolo. Manĉurio ne konvenas kiel kolonio, ĉar la japanoj mem konfesis, ke estas tre malvarma tie. Nek Koreo nek Formoso allogas. Se estus tiel, ili estus absorbintaj jam de longe la japanan plusloĝantaron. Sed Aŭstralio estas tre valora. Ĝi havas grandajn teritoriojn neokupitajn, kiujn neniu posedas en la Pacifiko. Jen kial Japanujo estas avida je via lando, kial via estonto estas en danĝero, kial ĝi ruiniĝos se kaŭze de malbonŝanco aŭ indiferenteco de l' demokrataj landoj, Ĉinio pereus.

EPISKOPO PAUL YU PIN

Estas bone konata fakto, ke generalisimo Ĉjang Kaj-ŝek, lia edzino, kaj multaj liaj konsilantoj estas piaj protestantaj kristanoj, kaj ke la protestanta movado ĝuste tial progresis multe en Ĉinio. Sed malmulte da homoj konas, ke el 4.000.000 da kristanoj tra tuta Ĉinio proksimume tri kvaronoj estas rom-

“Ni faras nian plej bonon por malebligi tian sorton. Ni daŭrigas la defendmiliton jam de preskaŭ du jaroj, kaj ni daŭre faros same eĉ se Japanujo ruinigos niajn urbojn kaj semos morton en larĝaj tavoloj de nia loĝantaro. Unu afero estas certa: ĝi ne povas mortigi nian animon nek nian spiriton. Ni estis pelataj en okcidenton, kie ni denove konstruos; iutempe ni venkos kaj reakiros ĉion perditan.

“Kiam la finvenko estos nia, ni ne forgesos la simpatian, kuraĝigon kaj subtenon, kio venas al ni konstante de l' aŭstralaziaj popoloj, kaj precipe de niaj samlandanoj tie loĝantaj, kiuj—mi bone scias—atentas la militon kun zorgo kaj espero.”

Elĉinigis

E. Tibu

katolikoj. Ĉi tiuj havas 130 episkopojn, el kiuj 30 estas indiĝenoj. Unu el la plej potencaj homoj en Ĉinio estas Episkopo Yu Pin, paroĥestro apostola de Nanking. Li ne nur estas eklezia hierarko, sed ankaŭ profundkora patrioto. Li naskiĝis antaŭ 38 jaroj en Manĉurio kaj konvertiĝis en katolikismon, kiam li havis dektri jarojn. Konsekrite en Romo, li ricevis episkopecon, kiam li estis nur 38-jara. La altstatura kaj belaspekta episkopo iam reiris al Eŭropo kaj benite de Papo Pius XI, li travojaĝis tutan Eŭropon, akuzis la japanan invadon en Ĉinio kaj petis helpon por siaj suferantaj samlandanoj.

Reveninte li estis elektita kiel membro de Nacia Politika Konsilantaro kaj aliĝis al la Ĉina Helpkomisiono. Nun li estas en Usono kiel reprezentanto de ĉi tiu institucio, veturas de urbo al urbo pledante por monhelpo kaj bojkoto kontraŭ japanaj varoj.

La episkopo konsilas ĉiujn katolikojn helpi la generalisimon kaj pruvi ke Ĉinio ne estas komunista per tiu fakto, ke Ĉjang Kaj-ŝek estas unuanime subtenata de ĉiuj 130 katolikaj episkopoj en Ĉinio kaj ke li faras sian propran mision kiel oficiala registara sendito.

SPERTOJ EN "DAJ NIPPON"

Aventuristoj, enŝipiĝintaj en jaĥtoj kaj barkoj, sen la protekto de usona aŭ brita nacieco —kvankam tio ankaŭ ne ĉiam helpas—devus anticipi maldolĉan kaj korŝiran traktadon, se ili malfeliĉe surlandiĝus neatendite en japana teritorio. Ĉi tiu fakto estas klare substrekita en la letero alveninta en Ŝanghaj de unu el la ses membroj de la grupo, kiu veturis el Ŝanghaj la 16-an de oktobro en la lasta jaro en la jaĥto *Visla* por vojaĝi al Nov-Zelando.

La leteron skribis V. K. Trifonoff, ruso, kiu antaŭe estis volontulo en la Rusa Roto de la Franca Koncesio. Li ekŝiĝis por partopreni la jaĥtekspedicion. Ĉi tie ni prezentas ekstraktojn el la letero.

Stormo devigis surlandiĝi

“En la kvara tago de nia veturado el Ŝanghaj la jaĥto difektiĝis serioze dum ŝtormo. Bezonte tujan riparadon, ni ellandi-

Fine estas substrekinda por la esperantistaro la fakto, ke episkopo Yu Pin apartenas ankaŭ al nia verda mondo, kiel nova esperantisto. Lin konvertis pastro Francisko Kao lastjare, kiam li vojaĝis en Eŭropo.

ĝis en Iŝigaka, sur Aojama insuleto, proksime de Formoso. Tute neatendite ni estis tuj arestitaj de japanaj ĝendarmoj, akuzite kiel spionoj por Anglujo kaj Usono. Ili ignoris nian pĉton, ke la jaĥto estu trenita en la havenon per preterpasanta vaporŝipo. La eltranĉaĵoj el la *North China Daily News*, kiuj koncernas nian forveturon el Ŝanghaj, ne helpis nin. Dume ili priridis, kiam ni asertis, ke ni veturis 600 mejlojn en kvar tagoj.

“Dum kvar monatoj da retenado, ni travivis inferon. La plumo preskaŭ falas el miaj fingroj, dum mi provas priskribi la torturojn, spertitajn de la membroj de la jaĥto. Tial ke ni ĉiuj ses estis retenitaj samtempe, la jaĥto kun ĝia ekipaĵo, lasite sen gardo, fariĝis viktimo de rabistoj. Poste ni sciigis, ke la polico mem faris por si plejbonon. Niaj konservitaj aĵoj kaj kompleta serio de kuiriloj malaperis entute.

Rabado kaj torturado

“La ĝendarmoj devigis nin por ŝanĝi niajn usonan monon kaj ili donis du jenojn por unu dolaro. Post mallonga tempo nia mono elĉerpigis; tiam ili ne hezitis disponigi al si niajn plej bonajn

aĵojn. Nenio restis al ni. Vestoj, ŝuoj, poŝhorloĝoj estis akiritaj de la policĉefo, kiu pagis al ni unu ĝis tri jenoj por ĉiu artiklo. Niaj pluvsurtoj, "prunteprenitaj" de la polico dum pluvŝtormo, malaperis por ĉiam. Krome la polico komencis turmenti nin per "pruntoj" el la mono, kiun ni ricevis el la "aŭkcio" de niaj posedaĵoj. La plej kruela el ili estis la interpretisto Katzura, malpura, ruza kaj senkompata individuo.

"Post du monatoj de inkviziciaj ekzamenoj, dum kiu tempo ni estis ne malofte vangofrapitaj, la polico fine decidis nin sendi al la haveno Naĉa, granda insulo proksime de Japanujo, kie oni ĵetis nin en karceron kun japanaj malliberuloj. Ĉi tie la japana polico montris pli da ĝentileco kaj aspektis pli kompatema.

"La japanaj malliberuloj, kiuj restis kun ni en la karcero, verŝajne estis akuzitaj pri bolŝevismo. Tage kaj nokte ili estis elkondukitaj unu post la alia. Ni povis de malproksime aŭdi ilin krian-taj. La ekzamenado estis en plena progreso! Nokte, kiam la gardistoj endormiĝis, la ario de la "Internacionalo," fajfata de la japanaj internigitaj, resonis tra la karceroj.

"Finiĝis la kvarmonata retenado. Tiam la aŭtoritatoj ne plu volis nin nutri. Ni fariĝis ŝarĝo al ili. Ĉar ĉiuj posedaĵoj mal-

aperis, ni devis forvendi la jaĥ-ton mem. Sed kiu estus volinta aĉeti ĝin? Ĝi karambolis kun rokoj, neprizorgate dum kvar monatoj la helico difektiĝis, la motoro estis en kompleta malordo. Tial la vendo estis nebla, sed tamen ni devis foriri.

"Semajnon antaŭ nia forveturo oni permesis nin skribi leterojn. Unu el nia ŝipanaro, pola civitano, priskribis nian odiseon kaj prezentis nian malfeliĉon al la pola konsulo en Tokio, petante financan helpon. La letero estis skribita sub la kontrolo de japana ĝendarmo kaj detale ekzamenita. Oni klarigis al ni, ke nia manĝado kaj aliaj elspezoj estis pagitaj de la japana registaro kaj tial devis esti plene repagota per la ricevota sumo de la pola konsulo.

300 jenoj da monpuno

"Baldaŭ venis respondo de la konsulo, kiu informis nian polan kolegon, ke la bezonata sumo estas tuj sendota. Sciinte tion, la japanoj monpunis nin je tri cent jenoj pro nia eniro en malpermesitan zonon. Samtempe ili sciigis, ke tri el ni estas profesiaj akrobatoj, tial ili devigis nin amuzi spektatorojn en loka cirko. Ni gajnis 200 jenojn, kio egalas 15 procentojn de la tuta enspezo, sed en la pagotago ni trovis, ke ni ŝuldis ankoraŭ 29 jenojn. Estis klare, ke ju pli ni

LA ĈINA SKOLTA SERVO DUM LA MILITO

Malgrandaj herooj

Kaŭ Jung

Sur la milojn da mejloj longaj linioj de batalfrontoj, etendiĝantaj de la nordo ĝis sudo, ĉinaj skoltoj kuradas senlace de la komenco de la milito. Ili kapablas konduki aŭtomobilon, flegi, paroladi, ripari kaj instali telefonaparatojn; ili servas en armeoj, sur la kampoj de vunditaj soldatoj, en trejnlokoj de nove rekrutitaj soldatoj, en klinikaj trupoj kaj en diversaj registaraj institucioj. Ili jam tramarŝis

dekkvar provincojn kaj tridek-ok distriktajn ĉefurbojn.

Urga mobilizo

En la posta tago de la 13-a de aŭgusto 1937, kiam eksplodis la milito en Ŝanhaj, la skoltoj estis tuj mobilizitaj per urĝa ordono. La Ŝanhaja Skolta Militserva Trupo organiziĝis en tertremigaj kanonbruoj. Kvincent skoltoj koncentriĝis en la daŭro de tri tagoj.

laboras, des pli la ŝuldo grandiĝis. Ĉiutage ni estis provizitaj per du jenoj, kiuj ebligis nin aĉeti bataton, farunon kaj iom da grasaĵo. Ni estis agacitaj de la manko de tabako.

“Nia cirka vivo finiĝis kune kun la malapero de niaj restaj vestaĵoj. La pola ambasadoro, ĉagrenite de nia sorto, prezentis sian peton koncerne nian aferon al la japana ministro por eksterlandaj aferoj, kiu asertis al li, ke ĉiuj malaperintaj objektoj troviĝos kaj estos redonataj. Kiam ni revenis al la jahto, ni trovis nur du barelojn da akvo el la kvin, kiuj estis antaŭe. Ĉio alia

—pladoj, teleroj, kaldronoj, serio de kuiriloj, fotoalbumoj—malaperis.

Adiaŭo al la ‘paradizo!’

“La jahto prezentis mizeran aspekton. Sepdek jenoj estis bezonataj por ĝia riparo—kvankam nekompleta—sed sufiĉa por forveturi el la japana ‘paradizo.’

“Nun ni estas en la Filipinaj Insuloj, intencante iri al Aŭstralio. Post nia restado en Japanujo, ni estas forte impresitaj de la ĝentileco kaj amikeca sinteno de filipinanoj. Niaj spertoj kun japanoj restos ĉiam en nia memoro kiel terura inkubsonĝo.”

Ĉe la komenco de mobilizo venis al la registra oficejo iu knabo kun enskribilo, kiun li prezentis al la oficisto, petante:

“Sinjoro, mi deziras aliĝi. Ĉu vi ne scias, ke mi venis el malproksima Ĉapej? Mi ne povas reiri senrezulte, kiel hieraŭ.”

Amiko, mi tre bedaŭras, sed antaŭ ĉio vi devas peti permeson de via patro.

Alia dekkvinjara knabo alkuris kun ĝojoplena vizaĝo.

“Kamaradeto, ĉu vi deziras sin anonci?”

“Jes, certe.”

“Ĉu vi pretigis la aliĝilon?”

“Jes.”

“Ĉu vi posedas la atestilon de via trupestro?”

“Jes, mi havas.”

“Ĉu vi jam ricevis la permeson de via patro?”

“Jes.”

Sed en tiu momento kiam la oficisto prenis la plumon por skribado, li rimarkis ke la knabo ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por la grava tasko, kiun postulas la militaj cirkonstancoj.

“Kamaradeto, kiom da jaroj vi havas?”

“Dek kvin.”

“Mi bedaŭras. Nia trupo postulas knabojn, kiuj almenaŭ havas dek ses jarojn. Vi estas nur dekkvin jara, tro juna!”

“Ne, ne, mi naskiĝis en januaro. Tial mi havas almenaŭ dekkvin kaj duon jarojn.”

“Ne, kara, ni ne akceptas pli junajn knabojn.”

Ĝis la 30-a de aŭgusto 3.500 geknaboj enskribiĝis, el kiuj unu kvinono estis knabinoj. Ili dividiĝis en naŭ distriktajn trupojn kaj cent kvardek labortrupojn, apartenantaj rekte al la korpuso. La unua grupo konsistis el la kolektive aliĝintaj trupoj kaj la dua el individuaj skoltoj.

Sango de skoltoj

Estis kvar skoltaj viktimoj dum la Sanghaja milito en 1932. Por rememori ilin oni starigis monumenton en Sanghaj al kiu pilgrimis ĉiujare multaj skoltoj.

“Ni marŝas kuraĝe sur la vojo de nia nacia libero, sekvante la postlasitajn spurojn de niaj kvar mortintaj kamaradoj!” Tiel skribis Caŭ Bin, la skolto de la Dua-Distrikta Trupo al sia amiko, laborante en la Granda Mondo amuzejo transformita en rifuĝejon.

Caŭ Bin laboris jam sep horojn en la rifuĝejo, kiam japana aeroplano faligis bombon sur la domon. Caŭ Bin fariĝis la unua viktimo fidela al sia laborposteno! Liaj kolegoj trovis en la ruinoj nur lian ĉapejon.

En la 23-a de aŭgusto 1937 alia japana bombo trafis Nanking Straton. Ho Kŭo-su, skolto en la Dua-Distrikta Trupo, estis la unua persono, kiu kuris tien por



Ni defendas nian landon.

Cang Ceng Ŭi

preni savlaboron. Sed malfeliĉe la dua bombo ĝuste falis sur la saman lokon. Kiam aliaj skoltoj alvenis, ili trovis nur la epoleton markita No. 766 kaj la sangan kravaton.

Per ilia aktiva laboro la skoltoj ne malofte frakasis la komplotojn kaj atencojn de spionoj kaj perfiduloj. Tial la japanoj turnis sian atenton al niaj skoltoj.

Dum tri monata laborado en Ŝanghaj, mortis du skoltoj pro aeratakoj, unu de kuglo, du de laciĝo pro pena laborado, tri en la manoj de japanaj aventuristoj, unu kaptite de japanaj soldatoj kaj krome vundiĝis sep personoj.

Rezultoj de la laboro

La skoltoj laboris kun senprecedenta kuraĝo kaj ĝojo, konsciente la noblan celon de ilia agado. Dum la periodo, kiam la batalo atingis la plej sangan kulminon, la skoltoj transportadis ĉiutage ĉirkaŭ kvincent vunditajn soldatojn. Sur preskaŭ ĉiu ambulanco deĵoris almenaŭ unu skolto, kiu sola direktadis la transportadon al hospitaloj. Por savi vunditojn ili trapenetris tranĉeojn, konstante minacatajn de malamika fajro. Ne malofte okazis mortdanĝeraj akcidentoj, kiel renversigoj kaj katastrofo de ambulancoj. Kiam amasiĝis aro de vunditoj, laŭ la daŭro de la

milito, ili devis eskorti ilin al malproksimaj hospitaloj. Foje ili devis veturi du-tri tagojn for el la urbo. Laŭ la fiksita laborprogramo, la laborhorro konsistis el 12 horoj ĉiutage, sed ofte ili laboris dek ses horojn. Ili apenaŭ havis okazon komforte tradormi la nokton. Ofte ili pasigis la nokton sub ambulanco. Laboro rekompencis ilin per koto, kaj malamikoj aŭ vunditoj makulis ilin per sango. Saman malfacilon ili trovis en sin nutrado, kiel en dormado.

Krom en batalejoj, unu triono el iliaj laboroj plenumiĝas en militaj hospitaloj. Nur en Ŝanghaj ili laboris en dudek kvin hospitaloj kaj flegis centmil vunditajn soldatojn.

Ili provis dividi la suferojn kun la soldatoj, servante al ili per ĉiuj rimedoj. Foje japanaj aeroplanoj atakis la provizoran hospitalon en Ĉenĵu, kie dudek skoltoj ĝuste bandaĝis la vundojn de soldatoj. Ĉiuj forkuris por sin savi, sed la skoltoj restis kun la vunditoj!

Ilia sindonema laboro por rifuĝantoj ankaŭ meritas laŭdon. Iam ili transportis dek sep ŝarĝaŭtojn da rifuĝantoj. Mil sescent kvardek-ok skoltoj laboris en cent kvardek-ok rifuĝejoj. 54,467 rifuĝantoj vivas en Ŝanghaj ekskluzive per la konstanta helpo de skoltoj. Kiam al ili mankas nutraĵoj, la skoltoj ko-

lektas por ili. En la vintro ili kolektis vestojn. Nur en Ŝanghaj ili akiris 132,917 subvestojn kaj 2.000 pluvsurtoj, 10.400 malnovajn kotonvestojn kaj 50.000 konservaĵojn.

Iam kvar skoltoj eskortis rifuĝantojn al iliaj naskiĝlokoj. Survoje ili estis atakitaj de japanoj, kio forrabis la vivon de du skoltoj.

Krom tiuj laboroj la ĉinaj skoltoj partoprenas ankaŭ diversajn taskojn en la fronto. Ili faras teknikan laboron, helpas ĉe milita trafiko, transportas militajn komunikojn kaj konstruas defendejoj.

Nur en Ŝanghaj ili kaptis kvar perfidulojn kaj tiel ili ĉesigis la provizadon de nutraĵo al la japanoj. Simpatiante ilian laboron, ok studentoj el foraj provincoj aliĝis al ili; unu lernanto venis piede el Suĉoŭ por la sama celo. Iu usona skolto nomata H. F. Lowler ankaŭ aliĝis, preninte ĉinan naciecon, kaj nomon—Lu Hŭej Fung.

Nacia hero'ino

En la nuna ĉino-japana milit-epopeo aperis unika heroino, kies nomo brilas grandioze sur la paĝoj de ĉina historio. Kiel ano de ĉina skoltaro, la skoltino Jang Hŭej-min, (No. 41) aŭdis unue la novaĵon, ke la Norda Stacio falis, kaj ke okcent soldatoj sieĝite en la S-hang deponejo,

rifuzas submetiĝi. Unu el tiuj ok cent soldatoj traglitigis por helpopeti. Li renkontis unue la skolton No. 41. Ĉi tiu tuj kuraĝis en la tuta urbo al bonfaraj societoj, kaj disaŭdigis ĉe la Ŝanghaja Radio-stacio la helpopeton al la urba loĝantaro. Ŝi petis, ke oni oferu por la soldatoj 500 funtojn da sukero, 500 funtojn da salo, 500.000 biskvitojn. Je tiu alvoko en la skoltan oficejon enfluadis aro da donacaĵoj. En duonhoro kolektiĝis 200.000 biskvitoj kaj amaso da konservaĵoj.

Tiam venis al la rifuĝejo kuriero de la okcidenta fronto, kaj alportis komunikon de generalo Sun Jŭen-ljang adresita al la sieĝita regimento. Li petis, ke iu skolto kunportu ĝin al tiu izolita konstruaĵo.

En tiu vespero skoltino No. 41 sola iris transdoni la komunikon. Trairinte la koncesion, ŝi atingis finfine la lokon, tra teritorio konstante minacata de fajro.

“Kamarado!” ŝi ekkriis al la sentinelo, “Mi venis por transdoni al vi komunikon.”

La sentinelo kondukis ŝin tuj al la vickomandanto. La brava ago de la skoltino tiel emociigis kaj kuraĝigis, ke ĉiuj ĵuris gardi tiun senhelpan postenon ĝis lasta homo. Responde al tiu letero oni donis al ŝi publikan leteron al la loĝantaro de Ŝanghaj:

“Estu trankvilaj, niaj samlandanoj!” Ni gardos ĉi tiun lastan postenon ĝis la lasta guto de nia sango!”

Reveninte al la skolta oficejo la nomo Jang Hŭej-min surdige bruadis ĉe ĉies oreloj. Ĉi tiu novaĵo ankaŭ trafis la stabejon de la 88-a Divizio. La vickomandanto de la divizio venis viziti persone ĉi tiun heroinon. Post laŭdego li prezentis alian peton al ŝi;

“Mi petas, ke vi kunportu ĉi tiun nacian standardon al tiu regimento, por ke ili flirtigu ĝin alte sur la S-hang deponejo.”

En la sekvanta tago frumatene aperis glorie la fiera standardo de Ĉina Respubliko sur la tegmento de la lasta bastiono en la mezo de japanaj flagoj, kiuj ĉirkaŭstaris minace.

Post la retiriĝo en la koncesion, petate de la koncesiaj aŭtoritatoj, ĉi tiu brava skoltino konstante kaj fidele laboradis por homoj suferantaj pro la milito. Kontraste al la senescepta amo kaj estimo de la ĉina popolo, la japana malamego ĉiam minacis ŝian vivon. Sed ŝi persiste plenumis sian taskon, restante en Ŝanghaj ĝis kiam oni sendis ŝin al la kongreso de mondjunularo en Usono, kiel unu el la ĉinaj delegitoj.

Ilia sango kunfluis

La skolto Ĉeng C-kjang vun-

diĝis grave, dum servo ĉe la fronto. Li perdis tro multe da sango kaj la kuracisto konstatis, ke li nepre bezonas sangtransflugon. La ĉirkaŭ li senpacience starantaj skoltoj sin proponis senescepte. Tiel la kuracisto finfine savis la jam preskaŭ senesperan vunditon.

De malproksime el Singapuro venis grupo de eksterlandaj ĉinaj skoltoj por partopreni la rezistmiliton de sia patrolando. Forlasante sian komfortan hejman vivon, ili alvenis la 23-an de septembro 1938 je siaj propra kosto. La grupo konsistis entute el dek ses personoj; naŭ knaboj kaj sep knabinoj. Dum la Ŝanghaja milito ili servis en la 160-a Divizio, kiu havis sian plej sangan batalon en Lotjen. Tie mortis tri kaj denove kvar pereis dum la retiriĝo al Suĉoŭ. Post la falo de Nanking postvivis el ili nur sep personoj. Tamen ĉi tiuj sep restantaj skoltoj neniom seniluziiĝis. Ili travadis la Flavan Riveron kaj marŝis al la Oka-voja Armeo, la plej fama partizana armeo.

En la granda venko en Ping Sing Kŭan kvar kamaradoj pereis glorie. El la restantaj tri unu perdiĝis, unu vundiĝis en Tajŭen kaj la lasta ĝisvivas en sana stato. Nun li sola denove aliĝis al alia skolta trupo, kiu iris al la fronto por servi al la reviviĝanta nacio!

FREMDAJ KONCESIOJ EN SANGHAJ

La frutempa historio de Sanghaj estas iel malklara, sed oni scias, ke ĝi estis grava komerca centro en la dekunua jarcento. Siatempe la komercaj rilatoj kun Okcidento estis limigitaj al Kanton. Trafiko estis kontraŭleĝa kun aliaj havenoj kaj oni ĝin daŭrigis sekrete. *La East India Company* en Kanton sendis privatan ŝipon, la *Lord Amherst* en 1832 al la nord-orientaj marbordoj de Ĉinujo. Iu s-ro Lindsay estis la respondeca gvidanto de l' ekspedicio, kiun d-ro Gutzlaff misiisto akompanis kiel interpretanto. La ekspedicio daŭris cent-naŭdek-du tagojn kaj la ŝipo iris norden ĝis Ŭejhajŭej kaj poste ĝi vizitis Koreon kaj la Luĉu insulojn. Dum la vojaĝo la Lord Amherst vizitis Sanghajon. Tie s-ro Lindsay intervjuis la Taotaj'on, kun la negativa rezulto, ke oni povas daŭrigi komercon nur en Kanton kaj ke li tuj returnu al sia loko. Oni interrompis tiam la klopodojn pri kreo de komerca kontakto kun Sanghaj ĝis la tielnomata "Opio-milito" in 1840-43. Dum tiu konflikto britaj mara kaj infanteria armeoj okupis Amoj, Ningpo kaj Ĉapu kaj ili atingis al Vusung la 13-an de junio en 1843. Oni surlandiĝis en la proksimo de Paoŝan kaj trair-

ante la landon ili okupis Sanghajon—kiu estis ĉirkaŭita per muroj—sen rezisto. La okupo daŭris nur dum kelkaj tagoj ĉar la britaj militaj fortoj retiriĝis por partopreni ekspedicion kontraŭ Nanking. Tie oni subskribis la unuan ĉino-anglan traktaton, kiu interalie konsentis, ke fremduloj povu establiĝi kaj komerci en Kanton, Amoj, Fuĉoŭ, Ningpo kaj Sanghaj.

Pli ol unu jaron poste, la 8-an de novembro en 1843, kapitano Balfour alvenis al la malnova, indiĝena urbo de Sanghaj por "malfermi" la havenon, kiel la konsulo de l' angla imperiestro. Tri aliaj personoj akompanis lin. Balfour ellandiĝis dum la sekvanta tago kaj serĉis lokon por la konsulejo. Post iom da malfaciloj iu ĉina komercisto el Hong Kong proponis al li domon en la urbo, kiu per tia rimedo provis sekurigi por si monopolon je la brita komerco. La konstruaĵo verŝajne estis tre kaduka, ĉar laŭ la priskribo de l' edzino de la sekvanta konsulo, ĝi estis pli duone finita barako ol loĝebla loko por eŭropanoj. Kapitanon Balfour sekvis kelkaj britaj komercistoj, kiuj devis trovi similan loĝlokon ĉe la limo de l' indiĝena urbo.

La vivo estis tre malfavora en

tia ĉirkaŭaĵo. La ĉina loĝantaro estis malamikeco. Tiel Balfour klopodis akiri anglan grundeton, sur kiu li kaj la aliaj britaj regnantoj povus konstruigi proprajn domon kaj oficejon. Li sukcesis sekurigi teritorion, limigitan sudden per la Jangkingpang-golfeto (nun Avenue Edward VII), per la rivero sur ĝia orienta flanko kaj per la nuna *Peking Road* en norda direkto, sed la okcidenta etendiĝo ne havis difinitan limon. La 29-an de novembro en 1845, oni informis la britajn ŝtatanojn pri la establo de koncesio kun proksimume 138 akroj da teritorio, kiu konsistis el kampo, disigita per golfetoj kaj grandaj teramasoj. Kontraste al la prodeco, poste adoptita en Tjencin, Hankoŭ kaj aliaj havenoj, la lando ĉi tie ne estis posedaĵo de la Krono kaj tiel la brita teritorio en Sanghaj estis kolonio kaj ne koncesia teritorio. Balfour tamen deklaris, ke membroj de aliaj nacioj povas havi teron nur kun lia konsento kaj tial okazis akraj diskutoj kun la usona komerca konsulo pri aĉeto de grundo kaj uzo de l' usona standardo.

Balfour etendis ĉi tiun teritorion aĉetante lokon al la brita konsulejo, kie ĝi estas ankaŭ nun kaj transportigis la konsulajn oficejojn.

Post la akiro de kolonio sekvis la administra organizo. La unua

regulo pri grundo publikigita en 1845, permesis ke la angla konsulo nomu tri honestajn komercistojn, kiel komisiono por vojoj kaj ĝetoj. Ili ne havis impostkolektan aŭ polican potencon, kaj la malgrandaj laboroj de ili fareblaj estis financitaj per kolektita mono. Krom servantoj, dungitoj kaj kelkaj komercistoj provizantaj la tagajn artiklojn, neniu ĉino povis loĝi en la koncesio.

En novembro, 1848, oni subskribis novan konsenton, laŭ kio la koncesia teritorio etendiĝis al la *Soochow Creek* (Suĉoŭ Krik) en norda direkto kaj okcidenten ĝis la *Defence Creek* (nun Yu Ya-ching Road). Ĉinaj gardistoj dungitaj de la fremdaj firmoj, estis la sola polica forto.

Dum la evoluo de tiuj aferoj ankaŭ la francoj akiris similajn rajtojn per la Ŝamproa-konsento por la nuna "franca koncesio."

Ankaŭ la usonanoj deziris akiri sian propran koncesion kaj episkopo Boon sukcesis havigi en 1848 teritorion laŭlonge de la riverbordo de la *Suĉoŭ Creek* al la hodiaŭa *Hongkju Creek*. Komence ĝin okupis ĉefe nur misiistoj, sed post nelonge ĝi fariĝis la areo de varfoj kaj doko. En tiu tempo ankoraŭ ne estis ponto super la Suĉoŭ Kriko; la plej multo de l' usonaj firmoj kaj la usona konsulo havis sian oficejon en la brita koncesio.

En 1853 pli ol ducent fremduloj kaj kvinmil ĉinoj vivis en la angla koncesio.

Ekzistis reguligo ĝis septembro de tiu jaro pri loĝado de ĉinoj. Tiam la "etglavaj ribeluloj" okupis la urbon, mortigis la urban registaron kaj kaptis la magistraton. La ĉina loĝantaro rifuĝis en paniko kaj miloj da homoj serĉis rifuĝejon en la brita koncesio, kie laŭ takso dudek mil ĉinoj loĝis en 1854.

La konduto de l' Imperia Armeo, kiu sieĝis la indiĝenan urbon en la sama jaro (1854), kreis krizon en aprilo. Post ripetaj atakoj kontraŭ la fremduloj ĉe la ĉevalkonkursejo, la brita konsulo sendis ultimaton al la komandanto de l' imperia armeo kaj postulis retiriĝon. Tio estis senespera provo, se ni konsideras, ke la ĉina armeo konsistis el dudek-mil homoj kaj la brita kaj usona konsuloj disponis nur pri 300 soldatoj kune kun la volontuloj, kaj du malgrandaj kanonoj. Tiu ĉi malgranda trupo marŝis sur la *Maloo* (nuna Nanking Road) kun tamburoj kaj flagoj kaj ili atakis la imperiistojn je la finiĝo de tempo de la ultimato. La lasta montris malmulte da rezisto. Kiam la du fremdaj kanonoj komencis pafi ilian kampon, la ribeluloj forlasis la urbon.

Ĝis tiu tempo ekzistis nenia urba administrado sur la fremdaj

teritorioj. Dum la kunsido de l' usona, brita kaj franca konsuloj en 1854, oni akceptis leĝon pri "ter-regulado," kiu garantias la rajtojn de l' fremduloj en la koncesioj, kaj tio estis poste sankciita per la fremdaj diplomatoj en Pekin. La komisiono pri vojo kaj ĝetoj ĉesis kaj ĝin anstataŭis konsilantaro kun rajto pri kolekto de imposto kaj organizo de policistaro. La reguloj realiĝis nur en la brita koncesio ĉar la franca ministro rifuzis ties konfirmon. Rezulte la franca teritorio daŭrigis sian sendependan vivon, kvankam oni formis konsilantaron nur en 1862 por la tielnomata franca koncesio. Ĝia teritorio etendiĝis en la antaŭa jaro per aldono de malgranda strio de grundo ĉe la riverbordo.

La usona koncesio konservis ĝian apartecon ĝis julio 1863, sed ĝiaj loĝantoj, kiuj ne sukcesis akiri permeson por propra polica administrado, plendis, ke ĉiuj vagabondoj, kiuj trovis jam tro "varma" la britan koncesion, migradis al la nordo de Suĉoŭ Kriko. Post konsento (21. sept. 1863) la brita kaj usona koncesioj kunfandiĝis, kaj ili formas la nunan Fremdan (Internacia) Koncesion. Nature, poste fariĝis necesa pli konvena konstitucio. La kunveno de l' impostpagantoj akceptis reviziitajn "terregulojn" kiujn la Fremda diplomatia korporacio sankciis

en 1869. Kun malmultaj esceptoj ankaŭ nun validas la samaj reguloj. Kvankam ili estas en multaj vidpunktoj dubaj kaj maladekvataj, pluaj kompletigoj ne povis okazi, ĉar la ĉinaj aŭtoritatoj opozas ion ajn, konsidereblan kiel eternigon de la fremda magistrato. La malgravaĵaj ŝanĝoj okazintaj dum la lasta jardeko, nur koncernis la pliigon de l' ĉina partopreno en la urba administrado.

La "terreguloj" ebligas ĉiujare la elekton de urba konsilantaro, kiu konsistas el maksimume naŭ personoj. Balotrajton havas ĉiu fremdulo kiu pagas jare kaj minimume 14 dolarojn da terimposto aŭ 700 dolarojn por loĝejo.

Kvankam post la rekono de loĝrajto al la ĉinoj en la koncesio, oni intencis reprezentigi ankaŭ ilin tamen okazis nur la unuan fojon en 1928, ke tri ĉinaj delegitoj prenis sian lokon en la urba konsilantaro. Tiu nombro altiĝis je kvin en 1930 kaj tiel la korporacio konsistis el naŭ fremduloj kaj kvin ĉinoj. Ĉi tiujn lastajn elektis la societo de ĉinaj impostpagantoj.

Kiam la ribelantoj forlasis la indiĝenan urbon en februaro 1855, la konsilantaro de Sanghaj eldonis proklamacion, reguliganta la loĝeblecon de ĉinoj en la koncesio. Ĝi rilatis je la obeo al la "terreguloj" kaj pago de

magistrataj impostoj. La atako de Tajping-ribeluloj kontraŭ Sanghaj, kaŭzis alian panikon en 1862, kaj rezultis la eniĝon de duonmiliono da ĉinoj en la koncesion. Kvankam multaj reiris poste al la urbo, tamen restis tie 90.000 homoj kaj la justeca administrado super la ĉinoj en tiu teritorio fariĝis akuta. Oni solvis ĝin en 1864 per la formo de miksitaj juĝistaro, kun prezidanto el la magistrataj delegitoj. Tiu ĉi tribunalo, kiu juĝis en la ĉinaj krimaj kazoj, funkciis ĝis 1927, kvankam ĝia potenco konsiderinde pliigis post la revolucio en 1911-12.

La sukcesan administradon de la koncesio multe helpis la spirito de l' fremda komunumo. Ili plenumis volontulan polican kaj fajro-brigadan servojn. Tiu ĉi lasta restis volontula organizo ĝis 1919, kaj ĝian efikecon multe stimulis la rivalado kun diversaj "Fajro Kompanioj."

Estas iu specialaĵo la Sanghaja Volontula Korpuso. Ĝi fondiĝis en 1853 kaj ĝi havis eventoplanan karieron ĝis reorganizo dum 1870-77. Ĝi devas esti la plej miksitaj korpuso de la mondo. Nuntempe troviĝas en ĝia kadro usona, brita, ĉina, japana, juda, filipinana, portugala, rusa kaj skota unuoj kun kelkaj skandinavo inter ili. Antaŭ la mondmilito ekzistis ankaŭ germana



**Mi ankaŭ aliĝos al la armeo, kiam mi kreskos granda.
Ceng Gja Cen.**

kompanio, kiu marŝadis per "anser"—paŝoj dum paradoj.

Kvankam estis grandega diferenco inter loĝado en la koncesio kaj la indiĝena urbo, ankaŭ la fremda komunumo ne ĝuis multe da komforto. Ole-lampo kaj kandelo estis la nuraj lumigiloj ĝis la establo de gaskompanio en 1865. Oni obtenis akvon el la rivero kaj putoj, ĉar la akvoproviza kompanio ekfunkciis nur en 1883. La unua elektra kompanio fondiĝis en 1882 kaj telefonkompanio en 1881. La elektra tramvoj-sistemo estis inaŭgurita en 1908 kaj aŭtobus-kompanio en 1923. Oni devis konsideri la ĉinajn sentemecon kaj kutimon ĉe ĉiu renovigo, sed post la utileco kaj praktika valoro, ĉiu antaŭjuĝo malaperis.

Oni povas diri, ke la industriigo de Sanghaj komenciĝis per la establo de l' unua moderna koton-fabriko en 1889. Antaŭ la eksplodo de ĉino-japana milito en aŭgusto 1937, ne malpli ol 64 kotonfabrikoj funkciis en Sanghaj kun pli ol 2½ milionoj da spindeloj.

El maldense populita peco de marĉa grundo Sanghaj evoluis al unu el la plej gravaj industriaj centroj kaj havenoj, en rango sur la seŝa loko en 1935 laŭ tunokvanto en-kaj-elportita en la havenoj de la mondo. Sed la grandeco de l' teritorio stagnas

de la lasta etendigo dum 1899. Tio grandigis la koncesion de 1.779 al 5.583 akroj, kiu nur provizore mildigis la troplenecon. Dum la politikaj maltrankviloj, kiuj sekvis la renverson de l' Manĉua Dinastio en 1912, la postulo de ĉinoj pri loĝado en la koncesio pliiĝis rapide.

Pro ĝia speciala stato—kvazaŭ lando en la ŝtato—la Sanghaja Magistrata Konsilantaro devis akcepti multajn respondecojn kiuj en alia lando, parte aŭ entute ŝarĝas nur la ŝtaton. I.a. ĝi havas sian propran armeon (Sanghaja Volontula Korpuso) kaj la profesian "Rusa Unuo." Ĝi havas karceron, kiu rilate la mezan nombron de tagaj malliberuloj, estas la plej granda en la mondo. Ĝi havas multajn hospitalojn aŭ donas al ili esencan helpon. La magistrato komencis subvencii la fremdan instruadon en 1880, la ĉinan edukon en 1900, kaj nun funkciigas, subtenas kaj helpas multe da fremdaj kaj ĉinaj lernejoj. Ĝi havas industrian sekcion, kiu sinokupas pri labor-problemoj kaj kontrolas same la rikŝonegacion, limigante la lukostojn kaj daŭrigante bonfaran laboron inter la rikŝistoj. Ĝi havas publikan bibliotekon, magistratan orkestron kaj plej modernan departementon pri publika sano. Imposto donas la financon bazon por ĉi tiuj institucioj kaj por la

subteno de polico, fajro-brigado kaj komunumaj konstruadoj.

La laboro de l' konsilantaro estis ĉefe politika kaj administra. De la evoluo de l' naciismo en Ĉinujo, ĝi daŭrigis seninterrompan batalon por sia ekzisto kaj por eviti sintrudon je ĝiaj privilegioj, precipe en la demando de impostpagoj kaj administrado de justo kaj policaj demandoj. Kiel lasta rimedo, la Konsula Korporacio devis egaligi la diferencojn kun la ĉinaj aŭtoritatoj. La konservo de l' koncesia stato dependas de la subteno de l' fremdaj konsuloj asistantaj al la magistrato.

Kvankam la Konsilantaro ne estis tre populara pro politikaj kaŭzoj ĉe la ĉinaj oficialuloj, tamen preskaŭ tri milionoj da ĉinoj vivas malantaŭ la limoj de la koncesioj.

Eĉ nun regas ankoraŭ la anglo-usonaj interesoj en la koncesio. De la kunfandiĝo de l' brita kaj usona teritorioj en 1863, ekzistas la plej intima kooperado inter la angla kaj usona komunumoj. Krom la du nomitaj nacioj, germanoj, svedoj, norvegoj, rusoj kaj anoj de l' aliaj nacioj servis en la Konsilantaro. La kresko de japana loĝantaro, kiu plimultiĝis de 736 en 1900 je 7.169 ĝis 1915, akiris japanan reprezentanton en la konsilantaro. Pro la daŭra kresko de la japana loĝantaro—kio verŝajne superas hodiaŭ

30.000—la japanoj sukcesis akiri ankoraŭ unu pluan lokon.

La ĉino-japana milito rezultis teruran plusloĝantaron suden de l' Soochow Creek. Oni taksas ke tri milionoj da homoj vivas en tiu parto de l' Internacia Koncesio. En la okcidentaj ekstra-koncesiaj stratoj interne de la defend-perimetro kaj en la franca koncesio, la popolo superas unu milionon kontraŭ 488 mil personoj, vivantaj tie en 1935.

Tiuj ĉi supraj ciferoj estas nur "seka" statistiko, kaj oni ne povas havi eĉ la plej modestan impreson pri la ŝanĝoj okazintaj de la eksplodo de l' nuna "incidenso." Estas vere, ke la koncesioj ankaŭ en la pasinto ne ĉiam sukcesis konservi siajn neŭtralecon, sed la aktuala konduto de l' konsilantaro, subpremo de parol-kaj-preslibero je la postulo de l' japanaj militistoj, tolero pri enmiksiĝo en la administradon de koncesia aŭtonomio, ĉio ĉi estis nur preludo al la japanaj celadoj pri la kreo de "Nova ordo en Azio." Oni kunigu nur la okazintaĵojn de l' plej proksima pasinto, la provokitajn incidentojn, fare de l' japanoj en la koncesioj de Hankoŭ, Kulangsu, Tjencin, kaj la sorto de tiuj koncesioj ne estas duba okaze de japana—eĉ se provizora—venko.

Kompilis *Tsai Yan*.

LA BATALINTOJ PAROLAS AL VI

Ni gratulas al la "novseria" INTERNACIISTO kaj pere de ĝi ni dankas la netakseblan valoron de l' IPE-laboro donita al ni per traduko kaj perado de salutleteroj, senditaj el Anglujo de sindikatoj kaj aliaj organizaĵoj. Ĉiuj leteroj estis senescepte tradukitaj kaj publikigitaj en ĉinaj tagĵurnaloj, kiuj petis tiaspecajn materialojn. Ĉisube ni represas leterojn el "Internaciisto," kaj esprimas per solidareca sento nian varman saluton al la heroaj kaj sindonemaj batalantoj de paco kaj libereco.—Red.

Mi estas aŭstro, antaŭe rifuĝinto en Ĉekoslovakio. Mi estis membro de la IPE-grupo en Moravska-Ostrava. 27 monatojn mi batalis en la diversaj hispanaj frontoj, kiel soldato de la "Internaciaj Brigadoj."

Ni atingis la francan limon samtempe, kiam okazis la retiriĝo de la kataluna armeo. Nun ni, "internaciuloj," estas kune kun la hispanaj kamaradoj en franca koncentrejo. Ni estas ĉe la maro kaj tuttage blovegas la vento kaj en niaj okuloj kaj manĝaĵo estas ĉiam sablo.

Ne ĉagrenu, ĉar mi sendas ĉi tiun leteron sen afranko. Bedaŭrinde ni havas nur hispanajn pesetojn...

Ricevinte viajn pakaĵojn kun la enhavataj "Sur Posteno," papero kaj kovertoj, ni kore dankas vin. Ankaŭ miaj kamaradoj. Vi tute ne povas imagi, kion signifas ĉi tie Esperanto-materialo por ni, en la soleco de la koncentrejo. Ni gvidas ĉi tie ankaŭ Esperanto-

kursojn kaj ili estas tre viglaj en la diversaj naciaj grupoj.

Por ni, "internaciuloj," la situacio estas tre malbona. Neniu lando volas akcepti nin, eĉ ne la skandinavoj kaj sudamerikaj landoj. Ni restos verŝajne en franca koncentrejo, ĉar ni nenie povos labori...

Francisko **HAIDERER**,
Camp de Concentration,
Groupe Autrichien,
(liôt i) **Gurs** (B.-Pyrénées),
Francio.

K-do José Borrell, konata aktivo de nia movado en Barcelono, kuracisto en respublika armeo, nun troviĝas en koncentrejo. Li petas medicinan literaturon. El liaj longaj leteroj, ni citu jenon:

"Mi tre dankas vian solidaron al la hispanaj infanoj kaj ĝenerale al la tuta hispana popolo. Verdire mi kredas, ke ni meritas tian atenton, ĉar nia lukto estis pli giganta ol ĝi ŝajnas al eksterlando. Fronte al ni estis plej

diversaj potencaj nacioj, kiuj solidare helpis al Franco dum la Respubliko restis sola, ĉirkaŭata de malamikoj. Eĉ niaj amikoj montris al ni ŝajne pli mokon ol protekton. Blum estas ekzemplo ĉe la dekstra flanko kaj Trocki ĉe la maldekstra...

Ŝajnas, ke la internacia afero nun multe priokupas francan kaj anglan registarojn. Nuntempe Germanio mastrumas tutan Eŭropon, escepte Sovetion. Mi opinias, ke la proksima milito bruligos tutan Eŭropon el kies cindroj naskiĝos socialismo..."

Adreso: *D-r J. Borrell*, îlot B, infirmerie Camp de Concentration **BARCARÈS** (Pir. Od.).

IPE-kamarado, J. Coll, sekretario de laborista Esperanto-Grupo en Grenoble (Francio), kurinte al Hispanio je la komenco de la ribelo de Franco, revenis al ni sen vundoj. Li skribis:

"Ironian dankon al la detrua bonvolemo de la tutmonda kapitalismo kaj al la malbona kompreno de la proletaro pri la vera lukto en Hispanio..."

Nova adreso: **Joseph Coll**, chez M. Noca, rue Station Ponsard, **Grenoble** (Francio).

Kun granda ĝojo mi ricevis vian leteron. Legita ĉe nia roto, kiel dokumento, ĝi plifortigis la dubemulojn kaj pravigis la

aliajn. En ĉiuj rotoj regas unuanima opinio ne reiri al faŝista opinio. La ĉi tieaj vivkondiĉoj erarigas neniun: ni konscias, ke ni estas en kapitalista lando kaj ĉiuj rezignacias...

Ĝi estas malpermesita la eniro de proletaj gazetoj. Tamen en ĉiuj kampamentoj (tendarejoj: 17 entute) aperas murgazetoj kun tradukaĵoj, precipe el "La Homaro"...

Okazis kunsido de la esperantistaj batalintoj: ĉeestis 29 kamaradoj el kiuj 12 estas "internaciuloj."

Mi havas du vundojn pro obuso en dekstra brako. Mi ĵus suferis operacion senrezulte, ĉar obusan fragmenton oni lasis.

Ni tre suferas pro malsekeco, malvarmo kaj vento, tiel proksime al Pireneoj. Al ni mankas litkovriloj, internaj vestaĵoj...

Ni volas PEK-labori kaj bezonas adresojn de tradukemuloj en Nederlando, Svedio, Norvegio, Sovetio...

J. CAMINO,

Islote letra P., baraca no 2,
Barcarès (Pyrénées-Orientales)
Francio.

Dum lastaj bataltagoj, ni ricevis de hispana IPE-ano komandanta brigadon sur militfronto ĉi-postan leteron:

"Preskaŭ tri jarojn ni batalis per pugnoj kaj dentoj kontraŭ la faŝistaj aĉuloj. La 'Ne-Interveno' malebligis nin defendi

dum la faŝistaj bestoj ricevis ĉiutage grandegajn kvantojn da materialo. Antaŭ la pasiveco de la “demokrataj” registaroj kaj popoloj, la internacia faŝismo detruas hispanan nacion.

Mi plenplenigus multajn fôliojn se mi volus esprimi la konstatojn kaj indignon de la hispanaj laboristoj, kiuj malgraŭ ĉio luktas kaj luktos ĝis ni posedos kvadratan metron da tero.

Eble iun tagon, ni aŭ niaj gefiloj povos juĝi nin kaj ankaŭ la sinmortigantan rolon de la internacia proletaro neunuigita, kiu ne vidas klare, ke la entrepreno de Hitler kaj Mussolini en Hispanio estas direktita ankaŭ kontraŭ la “demokrataj landoj” kaj speciale kontraŭ la laborista klaso...

Nia dolĉa kaj bela kataluna tero falis en la ungegojn de la “nigraj ĉemizoj”... Tamen mi havas ankoraŭ iometan esperon (nemultan kompreneble!) pri la franca popolo. Ĉu la danĝero de faŝismo minacanta la pirenean landlimon malfermos la okulojn de la franca respubliko? Se hodiaŭ ĝi restas surda, kiam ĝi pretiĝos kontraŭbatali siajn malamikojn? Francio havas la parolon...

De tri monatoj mi scias nenion pri mia edzino kaj familio. Mi supozas, ke ili trapasis la francan limon...

Kun fido, espero kaj forta volo por lukti ĝis la fino, mi salutas ĉiujn gekamaradojn kun la pugno alten...”

X., Komandanto de Brigado

Ĉu vi konas la du revuojn de SAT?

Monate aperas:

SENNACIULO

10 paĝoj inkluzive “La Lernanto.”

Oficiala organo de S.A.T. kun novaĵoj pri la movado kaj multaj artikoloj pri temoj interesaj por laboristoj.

SENNACIECA REVUO

20 paĝoj, Arta, kolora kovrilo. Riĉe ilustrita.

Kun enhavo soci-politika, literatura, pri-arta, scienca.

Granda nombro da konstantaj kunlaborantoj.

Sennaciulo (inkluzive membrecon al SAT): 5/- ŝil. jare.

Senn. Revuo (por membroj: 5/- ŝil.): 6/- ŝil. jare.

Petu specimenojn kontraŭ respondkupono k ĉiujn detalojn al S.A.T., 67, avenue Gambetta, Paris 20.

ORIENTA KURIERO

ESTAS INTERESA

VALORA

LEGINDA

LA TRANSFORMIĜO DE ĈINA KAMPARA EKONOMIO

Sun Sjo Ĉun

La nuna ĉino-japana milito, daŭranta jam preskaŭ du jarojn, alportis senprecedente radikalajn ŝanĝojn al la vivo de l' ĉinaj amasoj. Reale ĝi jam transformis ĉiujn trajtojn de Ĉinujo. Politike ĝi vekis nacian konscion en la popolo, kiu akcelis la unuigon de longe dispartigita lando: ekonomie, per la detruo de l' apudmaraj industriaj centroj, ĉesigis la ekonomian koncentriĝon kaj nun la akumulita kapitalo penetras en la agrikulturon, kio ebligas, ke la nacia ekonomio reviviĝu kaj refortiĝu el ĝia malnormala kaj duonmorta stato.

Krom la militaj kaj socialaj eventoj, la transformiĝo de ĉinaj kamparoj estas la plej grava, ĉar la ekzisto de Ĉinujo kiel nacio dependas ĉefe de ĝia agrikulturo. La ĉinaj kamparoj pereis kaj suferis multege pro la milito. En la rekte tuŝitaj distriktoj la amasoj diskuris kaj hejmoj bruligis. Enlande, kie ne okazis tia plago, tamen oni devis travivi pli mal pli amarajn spertojn almenaŭ en la komenco de la milito. La produktaĵoj amasiĝis pro manko de transportrimedoj kaj komplete interrompiĝis la cirkulo de l' agrikultura kapi-

talo. Ĉi tiuj malfaciloj poiome likvidiĝis post ses monatoj kaj transiris en prosperon, kiun ebligis unue la kresko de mana industrio bezonata por la milito, kaj due la blokado de havenurboj, kiu minimumigis la importadon de l' eksterlandaj—kaj absolute ĉesigis la penetron de japanaj—varoj. Spite ĉion, la popolo bezonas ĉiutagajn necesajojn. Tiu bezono instigis la fabrikadon de kotono, potolo, papero, k.a. Escepte la komencajn monatojn de la milito, la prezo de l' kamparaj produktaĵoj altiĝis, tio siavice plimultigis la enspezon de la vilaĝanoj, kiu estis plene utiligata por transportado.

Siaparte la centra registaro ellaboris planon por la normigo de l' agrikultura produktado, kaj nun ĝi kontrolas la transportsistemon, kaj eksport-importadon, reguligis la provizaĵojn kaj kotonproduktadon. Tamen, ĉi tiu prospero estas nur ĵus elteriĝinta ĝermo, kiu bezonas pli atentan zorgon kaj vartadon, garantiantaj pluan evoluon.

Oni tamen devas akcepti la fakton, ke la ŝanĝo de l' kamparanoj pli grandiĝis post la

· 苦痛的达达浪流
· 你们保不赔于鬼本日是



Tio, kion la japana invado kaŭzas al ni.

Ma Fej

milito. Tial, estas necese malaltigi la terrentumon, interezon kaj impostojn, kiujn la registaro provas solvi, helpate de oficialaj aŭ privataj institucioj. La rentumproblemon kontrolas la "Rentumreguliga Komitato" organizita de la registaro. koncerne la reduktion de interezo por monpruntado, oni solvis relative facile pere de bankoj, kiuj forpuŝas la procentegistojn, grandskale investas kaj subtenate de la registaro, donas krediton al kamparanoj, nur je unu procento de interezo.

La terproblemo estis la plej grava kaj komplika demando en Ĉinujo tra ĝia tuta historio.

Malsaĝa Lao Da havis tricent dolarojn. Elironte la domon, li ektimis ke eble oni ŝtelus la monon. Li kaŝis la dolarojn sub la teron kaj fiksis paperon al la sama loko kun jenaj vortoj: "Ĉi tie ne troviĝas tricent dolaroj."

Najbaro A Ni venis al la domo kaj rimarkis la skribaĵon. Li ridegis. "Kia stultulo estas Lao Da!" li kriis. Li elterigis kaj forprenis la monon, kaj evitonte suspekton, li skribis; "Ne najbaro A Ni forŝtelis la monon."

Sed dank' al la milito ĝi solviĝas almenaŭ en certa grado. En la postfrontaj provincoj la plugado de novaj nekulturitaj teroj ĉiam plivastiĝas. Pro la milito milionoj da rifuĝantoj migris sudokcidenten. Tio estas kolektiva translokiĝo de laborfortoj, kiuj sin esprimas en la kolektiva plugado de nekulturitaj teroj. Virgaj aŭ pro diversaj kaŭzoj neglektitaj kampoj nun estas kulturataj por produkti kaj prosperigi la nacian ekonomion. La nuna milito senkompate detruis kaj detruas la de miljaroj ekzistintajn fruktojn de l' homa ŝvito kaj sango, tamen aliflanke ĝi ebligas al Ĉinujo rekonstrui, rekrei kaj reorganizi la tutan landon, forĵetante la historiajn feĉojn, kiuj ĉiam baris la vojon al evoluo.

La filino de s-ro Ŭon estis unu jara. Oni volis ŝin svati al la du jara filo de s-ro Ĉan. S-ino Ŭon rifuzis la proponon. "Tio estas nebla" ŝi diris, "ĉar kiam nia filino havos dek jarojn, ilia filo estos jam dudekjara." S-ro Ŭon tamen aprobis la proponon. Li opiniis, ke la venontan jaron ankaŭ ilia filino estos dujara kaj konsekvence—la paro estos samaĝa.

GEOGRAFIAJ FAKTOROJ EN MALPROKSIMA ORIENTO

Tsai Yan

Oni priskribis jam el multaj vidpunktoj la problemojn de l' Azia kontinento. Estas tamen necese skizi eĉ se nur mallonge la geografiajn faktorojn, kiuj havas gravan kaj decidan influon je la rilatoj kaj kontaktoj de la landoj kaj nacioj en orienta Azio.

Azio estas la plej granda kontinento de la mondo kaj posedas proksimume unu trionon el la grunda de l' Tero. Laŭ historia kaj geografia faktoroj tiu ĉi giganta teritorio estas dividebla en kvar ĉefajn grupojn; Orienta Azio, kiu donis multe da trezoro al la okcidenta civilizacio; Norda Azio, enkalkulante Siberion; Hindujo, kiu mem estas tuta kontinento kun potenca kaj larĝe disvastiĝinta kulturo, kiu—oni povas diri sen troigo—influis la tutan mondon, kaj fine Ĉinujo. Ĉi tiuj teritorioj kun Japanujo kaj la Filipinaj insuloj estas “Malproksima Oriento.”

La tuta teritorio de Ĉinujo, inklude Manĉurion, Mongolujon, Tibeton kaj Sinkjangon, estas pli ol 7.000.000 kvadrataj kilometroj, kun 470.000.000 loĝantoj. Siberio respektive Sovet-Azio havas la duonon de tiu areo sed entute nur 12.000.000

loĝantojn. Siberio estas tre riĉa en arbaroj, agrikulturaj produktaĵoj kaj ercoj. Ĝia fiŝista industrio sur la marbordoj konsumas grandan kvanton el la salo de Ŝantung provinco. El la plej gravaj punktoj de tiu teritorio, Vladivostok, Dajren kaj Port Artur, la du lastaj estas nun japana posedaĵo. Por la evoluigo de Siberio kaj ĝin kunligi kun Eŭropo, Ruslando konstruigis la plej longan fervojon de la mondo. Tiu ĉi surtera linio havis kaj havas grandegan signifon, ĉar la menciitajn havenojn nur ĝi kunligis kun la ekstera mondo dum vintro, kiam la ŝipkomunikadon tute paralizas la frostiĝo de l' apudborda marsurfaco.

2

Kamĉatko kaj la Malaja duoninsulo estas la du ekstremaj finoj de l' Azia kontinento. Inter ili troviĝas du arkipelagoj: Japanujo kaj la Filipinaj insuloj, kiuj gardas la nordan, centran kaj sudan marvojojn al la kontinento. Preskaŭ en la mezo de tiu mondparto etendiĝas Koreo sur duoninsulo, kaj plej proksima al Japanujo. Norde estas la Okhots-marĉo kaj en ĝi Sakaĉin, Kuril kaj Jezo insuloj. De

tie sude estas la Japana maro kaj en ĝi mem Japanujo. Estas interese noti, ke Vladivostok kaj Koreo situas ankaŭ en la Japana maro. Tiu ĉi fakto havis gravan rolon dum la Ruso-japana milito en 1904. La Korea markolo donas konekton inter la Japana kaj Flava maroj. En tiun lastan etendiĝas du duoninsuloj kaj sur ili—Dajren, Port Artur, Ŭejhajŭej kaj Cingtaŭ. Suden ĉe la Ĉina maro estas suda Ĉinujo, Franca-Hindo-Ĉinujo, la Filipinaj insuloj, Borneo kaj Malajo.

La japana imperio konsistas el multaj grupoj de insuloj, inter ili Sikoku, Jezo, Kijuŝu, Honŝu, Formosa, la suda parto de Sakalin kaj Koreo. Dum la nuna kaj jam dujara milito denove pliiĝis la nombro de l' insuloj per Hajnan, Spratli kaj ceteraj, kiuj havas strategian signifon, estantaj sur la vojo al la britaj dominioj, Aŭstralio kaj Kanado.

3

Neniu alia lando havas tiom da tertremoj kiom Japanujo. Ĝia bordo ĉe la Pacifiko havas abruptan deklivon. Oni sondis kelkloke preskaŭ 9000 metrojn kaj tio estas la dua plej profunda marlito en la mondo. Supozeble, estas giganta kratero tie sub la oceano, ĉar el tiu regiono devenas multaj tertremoj de Japanujo. Aliparte la bordoj de la lando altiĝas sur la flanko de

Pacifiko kaj malaltiĝas ĉe la Japana maro. Tre verŝajne tio estas la kaŭzo de l' oftaj tertremoj.

Japanujo havas montaran teritorion: kontraŭ tio la marbordoj estas tre profundaj. La geografia izoliteco kaj manko de komunikiloj kreis klanan spiriton, kio ankaŭ hodiaŭ estas netuŝita kaj facile observebla ĉe la administro de la militaj kaj mararmejaj problemoj.

Proksimume unu sesono estas kulturebla el la kampoj de Japanujo. Tiu fakto kaj la manko de krudmaterioj plus la pliigo de la loĝantaro kaŭzas la elmigradproblemon, krom la feŭdalisma produkt-sistemo kaj neimageble malalta vivnivelo. Sed tiu feŭdalisma sistemo nun estas transformiĝanta kaj—kvankam la 'termino teknika' sonas absurda—komenciĝis la procedo de *industria revolucio*, la transformiĝo de l' ekonomia bazo de Japanujo. Ĝi bezonas krudmateriojn, karbon, oleon, ercojn—kaj merkaton por la produktitaj varoj. En la proksimo estas Ĉinujo, kiu povas provizi krudmateriojn por fabrikado, kaj—aĉeti grandkvante la finitajn produktaĵojn. La pozicio de Japanujo estas tre favora, kiel gardanto de la maraj vojoj, gvidantaj al Ĉinujo, kaj tiel ĝi povas konservi sian gvidpozicion tiel longe, dum ĝia navigacia potenco estas netuŝita.

La unika pozicio de Japanujo dependas de la regado de l' oceano kaj subpremo de Ĉinujo, ke ĝi ne povu fariĝi potenca nacio kaj ne estu kontrolata de la okcidentaj landoj.

4

Estis granda surprizo al multaj historiistoj, ke Japanujo povis leviĝi en duonjarcento kaj fariĝi unu el la mondpotencoj. La pozicio de Japanujo estas stranga, ĉar ĝi estas samtempe potenco kaj sensignifa lando. T.e. la pozicio de l' insullando similas geografie al Anglujo, estante ambaŭ tre familiaraj sur la maro. Tamen sur la Azia kontinento estas alia lando; Ĉinujo multe superas Japanujon en teritorio, krudaj materioj, en nombro de loĝantaro, kaj tio estas la bazo de l' potenco. Japanujo estis sekura de invado ĝis la 'epoko de vaporo'—eĉ Kublaj Kan kun

La sciulo

Iu sciis iom el la angla lingvo kaj li estis tre fierema. Foje oni montris al li anglan vorton en komerca letero kaj demandis ĝian signifon. Li gapis longe kaj fine ekparolis: "Tiu ĉi vorto ne estas angla, sed usona."

ĉiu lia povo kaj talento fiaskis pri la konkero de Nipono. Sed aliflanke ankaŭ Japanujo restis sendanĝera por ĝiaj najbaroj, kaj ĝi havis tute triagradan rolon en internaciaj rilatoj. Iu japana esploristo jam en la mezo de l' dekunua jarcento direktis ŝipojn ĝis la Amur rivero, kaj serĉis lokon por ekloĝado. En la dek-sepa jarcento ili atakis senrezulte Formosa'n kaj la ĉinajn marbordojn, aliaj velis al la Filipinaj insuloj, Hinda-Ĉinujo, Siam kaj eĉ tra la Pacifiko al Meksikio. Poste dum la deksepa jarcento la japana registaro fermis la havenojn por fremdaj ŝipoj, kaj malpermesis la konstruon de maraj ŝipoj.

5

Sude de Japanujo estas nur kelkajn horojn malproksime Formosa, kaj eble okcent kilometrojn de sudokcidenta Kŭangtung situas la Filipinaj insuloj. Ĉi tiuj insuloj formas la sudan pordegon de Azio kun la Malaja duoninsulo de la Hinda kaj Pacifika oceanoj. La arkipelago inkludas pli ol trimil insulojn, el kiuj multaj ne havas nur iom pli ol unu kvadratkilometran teritorion. Pli ol naŭdekono de la tuta areo—220.000 kvadratkilometroj—dividiĝas inter dekunu insuloj, el kiuj Luzon estas la plej granda.

Ankaŭ ĉi tie estas multaj vulkanoj, kun oftaj kaj tre fortaj

tertremoj. Ĉar tiuj ĉi insuloj estas proksimaj al la bordoj de l' Azia kontinento kaj Japanujo, ilia geografia graveco estas facile komprenebla. Ĉinaj ŝipoj atingis la Filipinojn multe pli frue ol la japanoj kaj ili daŭrigis viglan komercadon. Ĉinaj ŝipoj velis en tri tagoj al Luzon kaj vaporŝipoj nun bezonas ne pli ol dudek-kvar horojn de Manila al Hongkong. La unuaj ĉinaj vizitantoj alvenis la insulojn tre verŝajne jam dum la regado de Thang dinastio (618-906 A.K.) kaj supozeble ankaŭ jarcentojn antaŭe. Dum la Ĵuan kaj Ming dinastioj ekzistis tre grava komerca rilato. Same kiel la koreanoj kaj japanoj, ankaŭ la filipinanoj transprenis multe el la ĉina kulturo.

6

Nun ni rigardu tiun ŝtatsistemon, kiun reprezentas Ĉinujo, la plej potenca kaj signifoplena lando en Orienta Azio.

La historion de la "Ĉiela Imperio" grave influis kaj direktis geografiaj faktoroj. La dekok provincoj de Ĉinujo, do Ĉinujo propra kaj ĝiaj eksteraj provincoj—Manĉurio, Mongolujo, Sinkjang kaj Tibet—formas grandan triangulon, kies pinto estas ĉe la Pamir-plataĵoj en centra Azio kaj ĝia bazo etendiĝas de la Amur-Usuri riveroj en nord-oriento ĝis Hajnan insulo en

sud-oriento. La maro estas la bazo de tiu ĉi triangulo, dum la aliajn du flankojn borderas mont-ĉenaro; norde la Tjen San aŭ la Monto de l' Ĉielo kaj la Altaj aŭ Jablonoj. Ĉe la sudo etendiĝas la majesta Himalaja montaro, la krutaj plataĵoj de Jun-nan provinco kaj la malglataj montetoj, kiuj formas la akvoverŝilon de Si-kjang—la tria plej granda rivero de la lando.

Kun la escepto de du grandegaj ebenaĵoj, kun laŭvorte nelĉerpebla fekundeco, la teritorio de Ĉinujo estas altaĵo. Ĝia granda parto estas ekstreme riĉa en grundo kaj ercoj. Granda parto de la ebenaĵo estas en la orienta parto de la lando, etendiĝanta en preskaŭ kvarcent kvindek kilometra larĝeco de Hang-ĉoŭ, en Ĉekjang provinco, ĝis la najbareco de Pejpin. La Granda Kanalo trapasanta proksimume 2000 kilometrojn, kunligas ĉi tiujn urbojn, krom la nur antaŭ nelonge konstruitaj fervoj-linioj. La alia granda ebenaĵo kuŝas en la valoj de l' centra Jang-ce kaj Han riveroj. Ĝin kunligas en oriento la Jang-ce rivero kaj norde la Pejpin-Hankoŭ-fervojo.

Dum la ĉinoj disŝutiĝis tra la dekok provincoj, ili venkis la malfacilojn de tereno—ne kiel la antikvaj romanoj per konstruo de vojoj, sed—per la utiligo de akvovojoj por komunikaj celoj. Tio estis parte facile realigebla,

ĉar riveroj abundas en la lando. La pluan parton kompletigis la kanaligo de l' akvomankaj provincoj.

Ekzistas tri grandaj akvo-vojoj: la Hŭang-Ho, Jang-ce kjang kaj Si-kjang, kiuj kune kun la kanaloj servis por kunligi la landon kaj krei homogenan kulturon inter la popolo. La historio de Ĉinujo estis difinita per la grandaj akvo-vojoj kaj plataĵoj en nordo kaj okcidento. La dependo pri akvo-vojoj klarigas samtempe la grandan mankon de landvojoj. Preskaŭ unu kvinono de la vira loĝantaro de Ĉinujo estas okupata per transportado. Kontraŭ tio en Okcidento kvin procento de l' vira loĝantaro sufiĉas por la sama tasko.

7

En Azio estas du bone-konataj kaj—iom strange—gravaj ventoj. La unua estas la “*Taj-fung*” granda vento, kiu tiel ofte kaŭzas terurajn katastrofojn en Japanujo, la alia estas la “monsun.” Tiu ĉi lasta havis tre gravan influon ne nur je la temperaturo kaj pluvoj de Ĉinujo, sed ankaŭ je ĝiaj komercaj vojaĝoj en suda kaj okcidenta Azio kaj je ĝiaj negocaj rilatoj kun azianoj kaj eŭropanoj. La sud-okcidenta *monsuno* blovas dum somero de la maro kaj portis la velboatojn al Kanton tra Malaka, Sunda kaj Makasar ĝis preskaŭ

la unua de novembro, kiam ĝi ŝanĝas direkton. Tiam la nord-orienta “monsuno” dum la printempaj monatoj reportis la boatojn sur ilia vojo hejmen tra la Ĉina maro.

La ĉinoj komencis siajn maresplorojn ĉe iliaj bordoj minimume antaŭ mil kvincent jaroj, kvankam laŭ la nuna observebleco la granda oceano estis konstanta barilo. La ĉinoj ne estas tielnomata mara popolo, ilin tamen ne ligis la marbordoj. Interilato kaj komunikado al Hindujo estis jam konata en la kvina jarcento (P.K.). Pluraj delegacioj atingis Ĉinujon dum la sesa jarcento tra la maro el Hindujo.

Nur bonhumore

Lo estis tre ŝercema, sed lia najbarino des pli serioz-aspekta. La amikoj de Lo vetis, se li sukcesos ridigi la virinon per unu vorto kaj kolerigi per alia, ili invitos lin al festeno. Iun tagon, Lo vidis la virinon stari antaŭ ŝia domo: apud ŝi kuŝis hundo. Lo rapidis genufleksi antaŭ la hundo kaj nomis ĝin “Paĉjo!” La virino ja ridegis. Sin turnante, Lo nomis ŝin “Panjo!” kaj la najbarino kun koleregaj vortoj malbenis lin.

Analoj de la Thang dinastio el la sepa kaj oka jarcentoj priskribas la maran vojon de ĉinaj barkoj al la Eŭfrato de Kanton. Ankaŭ dum la dekkvina jarcento veturis ĉinaj ŝipoj al Hindujo, al la Persa golfo, Ruĝa maro kaj al la orienta parto de Afriko. La okcidenta influo proksimigis Ĉinujon ĝenerale de la sudo tra oceanaj vojoj. La sudaj havenoj ludis gravan komercan rolon kaj ili havis strategian signifon. Unuvorte tra la epokoj, la maro havis rimarkindan rolon en la historio de Ĉinujo.

La landlimoj de Ĉinujo propra havis gravan efikon je la historio kaj internaciaj rilatoj de Malproksima Oriento. Ĉinujo de tempo al tempo suferis la atakojn de la popoloj de l' duonsekaj plataĵoj en la nordo kaj okcidento. Kontraŭ ili konstruigis Si Hŭang-ti la Granda'n Muro'n en la komenco de l' tria jarcento antaŭ Kristo. Tiu ĉi 2400 kilometrojn longa muro konektis la pli fruajn konstruaĵojn kaj etendiĝis de Kansu ĝis la Golfo de Ljaŭtung.

El okcidenta direkto Tibet gardas Ĉinujon, kun preskaŭ netrapenetrebla teritorio kaj Sinkjang kun ĝia tre malfacila tereno. La unua estas plataĵoj, kun alteco varianta inter 3-4500 metroj. La alia ne estas tiel alta, sed ŝtonplena kaj dezerta. Oni alproksimigis Lhasa'n la ĉef-

urbon de Tibet, per gravaj komercaj vojoj same el Ĉinujo kiel el Hindujo. Pro tiu situo Britujo, Ruslando kaj Ĉinujo interesiĝis pri tiu lando. Tre malmultaj armeoj trapasis ĝian teritorion al Hindujo aŭ Ĉinujo. Sed malsupre en la valo de Ŭej kaj Hŭang-Ho premis la popolo de l' plataĵoj. La regantoj de l' Han dinastio decidis sindefendon kaj sendis armeojn por atako de la malamiko dum la du lastaj jarcentoj antaŭ Kristo, kaj jarcenton poste por konkeri la loĝantojn sur la plataĵoj de centra Azio. Tio estis brila periodo kaj faris eterna la nomojn de Ĉang Ĉjen, Pan Ĉjaŭ kaj Kan Jing. La mongola kaj tatara invadoj en la mezepoko estas postaj influoj al Ĉinujo. Kvankam la hunoj, mongoloj kaj tataroj subpremis kaj rulis parton de Ĉinujo kaj kvankam mem la ĉinoj disvastigis sian potencon malproksimen en ĉiun direkton, tio tamen restas fakto, ke la landon ĉirkaŭas zono de aliaj ŝtatoj, kiuj izolis ĝin ĝis la lasta tempo de ĉiu konsiderabla intelekta kaj kultura influo kun la plej multo de grandaj civilizacioj de la mondo. Rezulto estis la evoluo de speciala civilizacio dum tri mil jaroj. Ĝi trapasis multe da malfaciloj, sed vivas kaj daŭras ankaŭ hodiaŭ. Tibet, Mongolio, Manĉuria, Koreo, Japanujo, la Filipinoj, Orienta Hindujo, Malaja,

Hindo-Ĉinujo, Siam kaj Burmo ĉiuj sentis la rektan influon de l' ĉina civilizacio. La plej valora rezulto de tiuj ĉi kulturoj estas atribuebla al la civilizacio de la Meza regno.

Tiel bone provizita lando, kun ercoj kaj aliaj krudaj materialoj, kiel Ĉinujo, devas havi daŭre gravan rolon en internaciaj rilatoj. Ĉinujo havas pli multe da karbo ol iu ajn alia lando ĉirkaŭ la Pacifika oceano. Konsekvence, post la solvo de transportaj problemoj, ĝi regos la karbo-merkaton en Malproksima Oriento. Ĝia fer-rezervo ne estas tre granda, sed tamen pli multa ol tiu de l' aliaj landoj troveblaj ĉe la bordoj de l' Pacifiko. Laŭ taksado tiu kvanto sufiĉas por la evoluigo de la propra ĉina industrio sed ne por tiu de Japanujo. La kupro, tano, antimono kaj salo de Ĉinujo estas ankaŭ gravaj.

Oni ĉiam serĉis kaj bezonis jam en fruaj tempoj la industriajn produktaĵojn de Ĉinujo. Dum la Ming periodo ĉinaj kaj fremdaj ŝipoj eksportis krudan kaj fabrikitan silkon, brokaton, rabarbon, feron, salpetron, arĝenton, perlojn, gravuritajn ligno-varojn kaj galanteriaĵojn.

La kreanto de malproksim-

orienta kulturo ne havis rilaton kun la centroj de aliaj civilizacioj. Ĝian politikan kaj moralan subtenon serĉis ĉiu orienta lando. Ne estas do tro mirinde, se la ĉinoj rigardis la eŭropanojn same barbaroj, kiel la aliajn, kiam ili fine trovis vojon tra la maro al Ĉinujo. Kaj tio estas precipe komprenebla, se oni konsideras, ke la eŭropanoj atakis same la ĉinajn bordojn, kiel tion faris la japanoj dum iliaj piratadoj en la dekseca jarcento. La ĉinojn kaj iliajn landon protektis la geografia situo de la Ĉiela regno. Ili ne komprenis la grandan signifon de l' iloj per kiuj okcidento subjugis la naturon kaj superis geografiajn malfacilaĵojn. Sed la nuna stato, la relative tre rapida unuecigo de la lando, la industriigo de ĉe plej fora angulo de Ĉinujo, la retrovo de nacia konscio, la necesa adaptiĝo kaj adapto al kaj de la modernaj produktiloj, kun la fekundiga influo de fremda civilizacio kreas renesancon kulture kaj nacie, kaj Ĉinujo certe kapablos ankoraŭ krei al la homaro tiajn valorojn kaj trezorojn, kiuj elokvente pruvas la vivipovon de l' plej granda nacio en Malproksima Oriento.

Se vi volas gajni valoran ĉinan objekton, partoprenu la traduk-konkuron. Sendu poŝtkartojn, utiligotajn por ekspozicio.

ONKLINO KAJ GEKUZOJ

Elpin

Neniu miras pri la malbonaj flankoj de mia onklino, konante la personon, kia estas ŝi: babilema, stulta, malkaŝema, sentimentala tamen tro krude fortika. Estas tute nature, ke homo, kia ŝi estas, perdas ĉies simpation kaj kompaton. Tamen, ankaŭ ne mirinde, ke ŝi plendas kaj ĝemadas pri sia malfeliĉa vivsorto: la malsano forrabis de ŝi la edzon, kiam ŝi havis apenaŭ tridek jarojn. Eĉ en tia malfacilega cirkonstanco ŝi tamen ne ŝanceliĝis kaj kuraĝe staris kun siaj du malgrandaj georfoj, sin defendante kontraŭ ĉia surtera delogo. Ĉaste kaj solece ŝi vivadis, kiel simpla vidvino. Tia decidemo vidiĝis pli-malpli klare sur ŝia longa vizaĝo kun dikaj lipoj fiere kunpremitaj. La triangulaj okuloj borderitaj de okulharojn tegantaj palpebroj, al neniu donas favoran impreson.

Foje en ŝia junaĝo, kiam al virino de bonstata familio estas malpermesita eliri eksteren eĉ por simpla butikvizito, iam onklo aĉetis por ŝi paron da ŝuoj, kiuj estis iom malgrandaj por ŝiaj nekutime grandaj piedoj. Se ŝi estus iom prudente saĝa, ŝi estus dirinta la veron, ke ili ne iras bone sur ŝiajn piedojn. Ŝi

estis timema; ŝi ne kuraĝis tuj konfesi tion pro eventuale ricevota moko. Post ne longa tempo oni konstatis, ke ŝi lamas. Onklo furiozis. Li neniel povis toleri tian stultaĵon. Tial li forĵetis la ŝuojn, ĵurante ke li neniam plu aĉetos ŝuojn por ŝi. La larĝ-longaj piedoj estis tiel malgraciaj, ke onidire ĝuste tial onklo malŝatis ŝin, kaj ke li fine mortis en fremda loko, for de la hejmo. Efektive, estus ja mirakle, se oni povus eĉ en sonĝo trovi el ŝi de la verto ĝis la piedoj eĉ etan gracion aŭ delikatecon, kiun ĝenerale ĉiu virino povus posedi. Se oni klasifikus homojn laŭ bestotipoj, la tipo de la onklino estus ĝuste komparinda al tiu de ĉevalo.

Tia onklino, malŝatata, sed almenaŭ ne malamata, jam maljuniĝis fidele konservante sian ĉastecon, postulatan de ŝi laŭ orienta moro. Pli laŭdinde estas ŝia pena klopodo por varti kaj kreskigi en patrina prizorgado du infanojn ĝismature. Kaj nun ŝi estas avino de kvar genepoj. Tamen, malgraŭ la geneologia prospero, neniam ŝin forlasis malfeliĉo kaj malĝojo. Pli okulfrapa estas ŝia malĝojo post la edziniĝo kaj edziĝo de ŝiaj gefiloj. De la

sekvinta tago de l' edziĝo de ŝia filo jam okazis malakordiĝo inter ŝi kaj la bofilino. Ĉi tiu ne povis toleri afable la sintenon de sia bopatrino, kiu kompreneble ne povas kontentigi iun ajn modernan bofilinon. Komence, tamen oni kritikis malfavore la bofilinon, kies temperamento estis tro senkompromise atakema. Tial, nur post du monatoj de kunvivo onklino ekziliĝis propravole ĉe sia bofilo. De tiam ŝi blasfemadis pri sia bofilino al ĉiu, kiun ŝi renkontis. Tiuokaze la aŭdinto certe simpatiis al ŝi pri ŝia mizera situacio. Tamen, ne mankis ankaŭ klaĉemuloj, kiuj diras post ŝia dorso, ke ŝi mem kulpas pri ĉio.

La filino akceptis la patrinon senhezite. Oni laŭdis, ke ŝi estas fidela filino, kiu ne forĝas sian devon. Kiel bona, diligenta dommastrumanto, ŝi vartis konstante la bonepojn, lavadis vestojn, purigis meblaron, frotis plankon, k.a. Verŝajne ŝi trovis konsolon en laborado.

Apenaŭ pasis unu monato de la transloĝiĝo, kiam ŝi eksopiris al io unuamomente tute neklara. Sed tamen tio pli kaj pli ekzakte konturiĝis en ŝi kaj fine eĉ reflektiĝis sur ŝia mieno. Pli poste eksonis ĝemoj inter ŝiaj dikaj lipoj. Ŝi ekpentis la malakordiĝon kun ŝia bofilino; ŝi jam eksopiris reiri al sia propra filo, kiun tre verŝajne ŝi sentis pli kara kaj

proksima al si ol la filinon, kiu efektive apartenis al aliulo. Nun ŝi senkaŭze kredis, ke la bofilino mem atendas ŝian revenon. Tamen ŝi ne havis sufiĉan kuraĝon por reiri nepetite. Tio vundus la patrinan fieron, se ŝi reirus neinvitite. Ŝi bezonis ian rimedon. Tial ŝi komencis kritiki sian bofilon malbone, duonmalkaŝe, ke fru-malfrue ŝi reiros al sia filo, se tio estos realigebla. La famo iel-tiel atingis la orelon de la filo, kiu tuj revenigis sian patrinon, eĉ se li dubis, ke tio ne finiĝos en ordo por ĉiam.

La reveno de l' onklino kaŭzis grandan sensacion en la komunumo. Almenaŭ por kelkaj monatoj la klaĉado de babilemaj virinoj direktiĝis al la onklino, kvazaŭ al buĉota ŝafo, atendanta dismembrigon. Sed post kelka tempo oni ne plu bruadis, kredante ke ne okazas skandalo inter la onklino kaj bofilino. Efektive ne estis grava kverelo inter ili almenaŭ por kelka tempo, kvankam plena harmonio ne estis ebla. Ĉar la bofilino estis akusanta baldaŭ, tial ŝi ne havis grandan kialon levi armilon kontraŭ la onklino, kies laboremon ŝi bezonis ekspluati por certa tempo.

La bofilino akuŝis. Post ne longe ŝajnis, ke la pacienco jam elĉerpiĝis ĉe ambaŭ flankoj. Iam la onklino ekplendis pri la kruela traktado de sia bofilino. La

filino ne hezitis inviti ŝin al sia hejmo, ĉar ŝi mem bezonis la laboron de l' onklino.

Ne necesas citi kiom da fojoj kaj pro kiaj kaŭzoj ŝi transloĝi-

ĝadis de la filo al la filino. Tamen, efektive, tio okazis ripete en la jaro. Nun oni tiel kutimiĝis kaj indiferentiĝis pri tio, ke jam neniu atentis tion tiel streĉe



kiel antaŭe. Fine oni kulpigis ilin tute egale.

Jam pasis du trionoj de la dek dua monato laŭ luna kalendaro. La ĉiam pliakriĝanta frosto klare

anoncis la eblon neĝi en kelkaj tagoj. Iuvespere, kiam ni apenaŭ finis vespermangon, aperis antaŭ ni tute neatendite la onklino, kiu malofte vizitis nin antaŭe, pre-

cipe en la vespero tiel malvarma kiel la tiama. Ŝia subita ekapero vekis niajn miron kaj scivolon. Tamen ni akceptis ŝin kun altrudita rideto sur la lipoj. Samtempe regis nin miksitaj emocioj, kion kaŭzis la malfeliĉa vivsorto de nia onklino. Tre verŝajne io tute nekutima estus okazinta. Tamen ŝi ne estis tia virino, kiu facile kaj senpripense konfidas ion ajn eĉ al sia intima amiko. Tial vane ni atendis de ŝi, sciigi kia vento blovis ŝin al ni. Verŝajne panjo senpacienciĝis. Ŝi intence turnis la tiam daŭrantan konversacion pri kutima afero al alia direkto, kiu rekte tuŝas ŝian privatan vivon. Panjo demandis al ŝi kiel fartas ŝiaj genepoj. Tiam, subite larmoj vualas ŝiajn okulojn, senbrilajn.

“Mi estas elpelita de mia bofilino!” ŝi komencis per tremanta voĉo kun ioma hezitemo.

“Kio?” konsternite interrompis mia patrino, “Elpelite de via propra bofilino!”

Je tio la onklino restis muta; ŝi ne kuraĝis daŭrigi la parolon.

“Ho, hontu tiu virinaĉo!” ŝi insultis indigneme kun kolerplena mieno, “Kial ŝi traktas vin tiel nehumane?”

“Maljuna homo devas frumorti, anstataŭ esti ies ŝarĝo!” ĝemis la onklino kun pesimisma tono, sed sen ajna malamo kontraŭ ŝia persekutanto.

“Kial do vi ne rajtas esti pro-

tektata en maljuneco de via propra filo, kiun vi kreskigis sangon ŝvitante?” panjo protestis kontraŭ la abnegacia sinteno de la onklino. “Kion do diras via filo? Ĉu li permesas sian edzinon kondukti tiel al sia patrino? Se mi estus vi, mi neniel tolerus tion.”

“Kion fari, kiam edzino estas pli kara al li ol la patrino; krome li estas nun en Hankoŭ por serĉi laboron. Post la kverelo mi tuj alkuris al mia filino por resti ĉe ŝi, sed ĉifoje la bofilo rifuzis min akcepti, pretekstante ke li ne ŝatas plu miksiĝi kun tia afero. Kvankam li persvadis min reiri kun pacienco, tamen tio estas tute ne ebla. Mi jam decidis forlasi tiun malbenindan virinaĉon. Tial, pripensinte iom, mi venis ĉi tien por resti dum kelka tempo, se vi bonvolus komplezi tion. Mi sentas teruran honton, sed kion fari?”

Konforme al ŝia deziro ni disponis apartan ĉambron por ŝia restado. Aspekto ŝi sin trovis tute komforta en la ŝanĝita cirkonstanco. Ŝi mem deklaris fine, ke ŝi ne plu pensas pri la maldankemaj gefiloj. Efektive ĝenis nin ne malmulte ŝia seninterrompa babilado. Tamen, estis ankaŭ vere, ke ŝi neniom estis malbonintenca, se ne estis bonintenca; pli ĝuste dirite, tute senintenca. Verŝajne, al ŝi tute ne gravis la konsekvenco de babilado.

Ŝia nova vivo ĉe ni ŝajne milde, sen rimarkeblaj ondoj, glitadis kelkan tempon. Post du semajnoj venis ŝia filo, reveninte de sia vojaĝo. Li petis ŝin reiri al sia hejmo. Ŝi rifuzis obstine, ĵurante ke ŝi neniam reiros.

Post la foriro de sia filo, ni rimarkis, ke la onklino dronis en melankolian humoron. Ŝi ekĝemis kaj tutan tagon enprofundiĝis en ion, eĉ forgesante manĝi. Verŝajne la vizito de ŝia filo ekskuis la jam kvietigitan animon, kaj eklevis delikatan sentimentalecon kiu tamen ne montriĝis okulfrape. Ni ĉiuj ege kompatis ŝin. Nur panjo sola vane klopodis forigi el ŝi tiun malĝojon. Ŝi blasfemis la genevojn per malagrablaj vortoj, kiuj certe pikis la orelojn de la onklino. Unue ŝi kuntamburis en tia atako sen ofendi personon. Tamen ŝi tute ŝanĝis sian sintenon pri sia filo. Eble la patrina amo ne permesis tion. En tiu okazo la malbeninda babilemo mem tute ĉesis kaj de tiam ŝi restis tiel silenta, ke oni kredus, ke ŝia emo pri parolo estas pura kalumnio inventita de skandalserĉantoj. Efektive, de tiam ŝi fariĝis serioza, ĉiam gravmiena.

Tiel pasis kelkaj tagoj. Alproksimiĝis la novjaro. Kiel kutime oni interŝanĝis donacojn unu al la alia. El la donacoj de ni ricevitaj troviĝis du kestoj da

pomoj. Pro senpacienco ni petis panjon tuj malfermi almenaŭ unu el la kestoj. La patrinaj konvinkoj ne efikis al ni, kiuj ne povis atendi ĝis la novjaro. Fine la pomkesto estis elnajlita rapidege, kiel tombrabistoj malfermas enterigitan ĉerkon por trovi en ĝi valorajn artiklojn. La bubeto, mia frato, unue elprenis pomon kaj jam komencis frakasi, kun granda avideco. Tuj poste ni mem sekvis lian ekzemplon.

Ho, kiom vi estas avidaj? Vi eĉ forgesas onjon!” avertis nin la patrino.

Jes ja, ni tute forgesis ŝin almenaŭ en tiu ekscita momento. Poste panjo elprenis kelkajn pomojn kaj petis la bubeton porti al la onklino. Li suprenkuris du ŝtupojn popaŝe al la onklino. En tiu tempo ŝi jam malsuprenvenis renkonte al li.

“Ho, kiel ĝentila ci estas! Ci eĉ ne forgesas la mizeran onklinton” ŝi dankis la bubeton kun emocio.

Tagoj pasis ŝajne des pli malrapide, kvazaŭ testudo dum ju pli alproksimiĝis la novjaro. Fine restis du tagoj antaŭ ĝia alveno. Vespere, post kiam la onklino retirigis ne kutime frue en sian ĉambron, la bubeto flustris ion al la orelo de la patrino, tiel ke la apudaj personoj ne povu aŭdi. Tiam ŝi ekpaliĝis,

sed tuj sin regante, asertis al li, ke tio tute ne gravas. Tamen, verŝajne li ne estis persvadita, ĉar lia indignoplena vizaĝo aspektis al ni tuj eksplodonta. Niaflanke, la scivolemo atingis la kulminon, sed kion fari?—la patrino mutigis la bubeton. En tiu tempo mia pli juna fratino elŝteliĝis tute nerimarkite, kaj de ekstere ŝi jam vokis la fraton:

“Kial ci vokas min?” la bubeto demandis responde.

“Venu ĉi tien kaj rigardu ĉi tion!” ŝi allogis.

“Ne mensogu!” duondubante li respondis.

“Nu, ĉu ci ne volas rigardi?” demandis la fratino, kvazaŭ en minaca tono.

“Nu, mi iras,” perdinte paciencon, li alkuris al ŝi. Tuj poste mi ankaŭ sekvis lin. Sed la fratino senhonte trompis lin nur por sciigi de li pri tio, kion li diris al la patrino. Tial, komence li rifuzis malkaŝi la sekreton, sed samtempe li mem ne povis tion konservi, ĉar alie estis al li tro peza lia indigno.

“Mi ekvidis onjon kaŝanta multajn pomojn!” li komencis.

Tio ja estis fulmotondro al ni ĉiuj. Tamen ni ne devis suspekti ŝin sen konvinka pruvo; tial ni tuj komencis esplori la tutan aferon. Poste ni trovis, ke tio estas tute vera, kio estas ja granda skandalo neniam okazinta ĉe ni antaŭe. Apenaŭ ni

ekdiskutadis pri la necesa kontraŭrimedo, panjo aperis antaŭ ni tute senbrue. Ŝi minacis nin per senkompata puno, se iu ajn el ni parolaĉus plu pri tio.

De tiu tempo nia opinio pri la respektenda onklino tute ŝanĝiĝis. Ni pensis, ke ŝi neniel meritas nian respekton. Tial, ni komencis neglekti ŝin kaj resti ĉiam indiferenta pri ŝia persono, kiu antaŭ niaj infanaj okuloj estis nur hipokrita kaj malpura. Konsekvence ni kredis, ke ŝi meritas la persekuton de sia bofilino.

Fine la multe atendita novjaro anonciĝis. Venis vizitantoj kun plena ŝarĝo de bondeziraj vortoj. Ĉiuj en la hejmo dividis komunan ĝojon kaj gajecon. Tion des pli intensigis la ĉeesto de nia patro, kiu siatempè revenis post longa vojaĝo. Tamen, ni trovis, ke la onklino restas ekster nia rondo. En ŝia maldelikata mieno aperis iom post iom io stranga, eĉ ne bonaŭgura, kvankam ne klare. Trista malgajo sterniĝas morne sur ŝian vizaĝon. Tio intensiĝas paralele kun la neaŭdebla tempoglitado.

Ĉe la tablo de vespermanĝo la tragedio komencis prezenti sin. La onklino ekĝemis kaj alsopirante ion, preskaŭ ne tuŝis manĝaĵon; kun la preteksto, ke ŝi iom malsanas. Sed tio ne estis kred-ebla, io certe okazis. Kion fari? Post la vespermanĝo ni ludis in-

diferente karton, dum ŝi konstante ĝemspiradis. Subite ŝi ekparolis, kvazaŭ al si mem:

“Neniu venas!”

Ni eksciis, ke ŝi atendas iun; ke la afektita malsano estas nur maskita preteksto. Panjo tuj divenis, kiun do ŝi atendas.

“Ĉu vi atendas la maldankeman filaĉon; kiu eĉ ne kapablas rekoni la patrinan afekcion?” la patrino demandis per ironiema voĉtono.

La onklino perdis fine paciencon. La delonge retenita ploro eksplodis. Larmgutoj, jam vualintaj la okulojn, ekrulis tra ŝia longa vizaĝo.

“Almenaŭ mi supozis, ke ili venos hodiaŭ diri al mi bondezirojn por la novjaro. Ĝis hieraŭ mi atendis ilin duonfideme, sed de hodiaŭ frumatene mi estis en plena espero, ke ili nepre ne forgesos sian patrinon en la unua tago de novjaro. Sed vane; ili ne venis!”

Ni estis ege kortuŝitaj. Mankis al ni ĝustaj vortoj por konsoli ŝin en tiel malgaja momento. Ĉia malagraba antaŭjuĝo, kaŭzita de la pomŝtelo, malaperis en tiu momento. Ni ege bedaŭris ŝian malfeliĉan situacion, kondamnante la maldankemajn kuzojn.

Tiel pasis la unua, dua kaj tria tagoj en la melankolie premanta atmosfero. La necesa pacienco elĉerpiĝis ĉe la onklino. Tamen,

ŝia indigno iom pli mildiĝis. Tre verŝajne ŝia sopiro al ili kaj precipe al ŝiaj nepoj moligis ŝin. Fine ŝi decidis reiri al sia filo, venkinte ĉian konsideron. Nur la patrina afekcio superis ĉion. Frumatene en la kvara tago de novjaro kun paketo en la mano ŝi malkaŝis al ni ŝian intencon. Tio konsternis nin, precipe la patrinon, kiu tute malaprobis tian sin malestimantan sintenon.

“Kion fari? Ili tamen estas miaj propraj gefiloj!” la onklino sin apologiis kaj ekirante promesis, ke ŝi revenos antaŭ la vespero.

Post ŝia foriro okazis inter ni brua disputado pri ŝia ŝultaĵo. Ni ĉiuj senescepte malaprobis la onklinon. Sed la frato tiam protestis:

“Ĉu panjo ne amas min, eĉ se mi faras malbonon?”

Ni ĉiuj ridis pri lia naivcco, sed tamen la klaĉado daŭris, kiu hazarde tuŝis la pomŝteladon de la onklino. Tiam la fratino rimarkigis nin pri la paketo, kiun forportis la onklino. Efektive ŝi ne alportis ĝin, kiam ŝi venis al nia domo. La frato asertis, ke ĝi estas pompaketo. Ni tuj esploris la aferon kaj lia argumento tute pravus, kiam ni konstatis, ke nenio estas tuŝita de ŝi. Nur en tiu momento ni konkludis, ke ŝi ŝtelis pomon por siaj genepoj, kiuj laŭ ŝia supozo estus venontaj en la novjaro.

KIOM KOSTIS LA BOMBARDO DE ĈUNGKING AL JAPANUJO?

Laŭ la opinio de fremdaj aviad-specialistoj, kiuj estis en Ĉungking dum la lastaj aeratakoj, ĉiu "vizito" kostis unu milionon da usonaj dolaroj al Japanujo. Do la sinsekvaj kvin bombardoj en la nefora pasinto kostis kvin milionojn da usonaj dolaroj al la "Lando de leviĝanta suno."

Ni vidu la bazon de la menciita kalkulo. Proksimume 27 aeroplanoj partoprenis ĉiun atakon, el kiuj ĉiun fojon perdiĝis kvar maŝinoj. La uzita tipo de bombardilo kostas 125 mil usonajn dolarojn, respektive kvar da ili 500 mil dolarojn. Ĉiu maŝino portis sep aviadistojn; inter ili kvar kontrolis maŝinpaŝilojn. Eduko de aviadisto kostas 100 mil dolarojn en

Usono. Eĉ se ni konsideras la ĝeneralan "dumpingpovon" (de la japanoj kaj taksas nur je duona kosto la trejnon de japana aviadisto, ankaŭ tiam estas facile konstatebla ilia "taga prezo."

La kosto de benzino kaj bomboj estas ankaŭ konsiderinda. Ĉiu aeroplano portis ĉirkaŭe 1000 funtojn da bomboj, kies prezo estas proksimume 1.50 usona dolaro po funto, do po maŝino 1.500 usonaj dolaroj. Konsiderante, ke Hankoŭ estas la plej proksima aera bazo, ĉiu maŝino devis kunporti ok-cent galonojn da benzino por okhora flugado. La pogranda prezo de benzino estas 25 usonaj dolarcendoj en Sanghaj. Tio signifas ke ĉiu maŝino konsumis benzinon je du-cent dolaroj kaj la tuta eskadro je 5.400 usonaj dolaroj.

Vane ni atendis ŝin kelkajn tagojn. Ŝi ne revenis eĉ post kvar tagoj de ŝia foriro. Tial, panjo iris viziti ilin pro maltrankviliĝo. Reveninte ŝi rakontis al ni, ke ŝi restas tie tute trankvile kaj rifuzas reveni, spite ante ĉiujn anticipeblajn malfacilaĵojn. Panjo tamen opiniis, ke tio finiĝos malbone en la proksima estonto. Povas esti, sed ŝi ne plu revenis al ni.

La valoro de l' detruitaj propraĵoj en Ĉungking *ne superas 5 milionojn da ĉinaj dolaroj, sed tion atingi la japana armeo devis elspezi laŭ ĉina valuto preskaŭ kvardek milionojn da dolaroj!*

RECENZOJ

La Jarlibro de IEL—1939. Neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de IEL. Bazaj kotizoj: Membro kun jarlibro, 4 anglaj ŝilingoj; MA, 10 ŝil; MS, 25 ŝil.

En kelkaj landoj ekzistas speciala kotizo laŭ landa valuto. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Herons-gate, Rickmansworth, Anglujo aŭ ĉe landaj delegitoj kaj perantoj.

La Fakvortaro estas la plej

valora parto de la jarlibro, ĉar precipe orientaj esperantistoj sentas ege la mankon kaj bezonon de esprimoj ofte netroveblaj en nacilingvaj vortaroj.

Sol og Sundhed, la Organo de l' Dana Nudista Asocio krom dana kaj angla lingvoj aplikas ankaŭ esperanton.

Provegzemplero estas ricevebla kontraŭ du respond-kuponoj, kvaronjara abono kostas ses resp. kuponojn. Adreso: Naturisma Esperantista Asocio, **Randers**, Vestergade 21, Danujo.

JUS APERIS!

JUS APERIS!

TANAKA MEMORANDO

**Aŭtentika dokumento pri
ekspansiaj planoj de Japanio
34 paĝoj. Formato 19 × 13½ cm.**

Prezo: 10 cendoj usonaj
aŭ unu respond-kupono

Mendu ĉe **ORIENTA KURIERO**, Hongkong. P.O. Box 10.

NIAJ REPRESENTANTOJ:

ANGLIO: E. P. Ockey,
"Baroka," Winifred Road,
Coulsdon, Surrey.

ARGENTINO: Lazaro Flury;
San Jorge-F.C.C.A. Prov. de
Santa Fé.

AUSTRALIO: A. C. Shain,
37 Hopetoun Parade, Box
Hill E.11, **Victoria**.

BELGIO: Marcel Lemme,
Liège, rue Vivegnis 25.

KANADO: Leo Tozzier, 176
Times Rd., **Fairbank P.O.**
Toronto, Ontario.

FRANCIO: Fédération Espé-
rante du Travail, **Paris-**
8° 29, rue d'Anjou.

FRANCIO: Esperantista Cen-
tra Librejo, **Paris-6° 11**, rue
des Sèvres.

NEDERLANDO: Petro van
der Plank, **Amsterdam**
W., v. Spejkstraat 48/I.
(Poŝtĉekkonto 245542).

NORVEGIO: Alf Moe, **Oslo**,
Urtegt. 36/3.

SVEDIO: Svenska Esperanto-
byran, **Stockholm**, Barn-
husgatan 8.

SVISLANDO: Universala Es-
peranto Asocio, **Genève**,
Palais Wilson.

USONO: Amerika Esperanto
Instituto; 1111 Brooke Rd.,
Rockford, Illinois.

KORESPONDADO

K-do *Torvid Edvardsen* dezir-
as korespondi kun gek-doj el
Sovetio, Ĉinio kaj cetera Azio.
Tutcerte respondas.

Adreso: **Mosjœen**, Tordens-
kjoldsgata, Norvegio.

S-ro *S. Nicholl*, 48, Tudor
Way, Petts Wood, **Kent**. An-
glujo. Deziras korespondadi kun
ĉiniaj samideanoj.

K-do *E. A. Mattheissen*, dezir-
as korespondi kun ĉinaj k-doj aŭ
k-dinoj. Nepre respondas.

Adreso: 299 Telisestowe Road.

Ipswich (Suffolk). Anglujo.

K-do *Joĉi Toan* deziras kores-
pondadi kun gek-daj precipe el
Sovetio, Usono, Danujo kaj
Nederlando.

Adreso: Tung-chi Universitato
Kunming, Yun-nan, Ĉinio.

S-ano *Peter Thomas*, deziras
korespondadi k.ĉ.l. kaj inter-
ŝanĝi p.k., p.m., leterojn, re-
vuojn, fotojn, ktp.

Adreso: 556 West 126 St.
New York City Usono.

葉全	陳暢儂	莊世平	成	馬代輝	劉文魁	之	周緒成	章宰	陳涓涓	陳忠宣	同順利	紀康	王文奇	泰昌	陳段	伍勤英	紀康	陳寶珍	方敬發	吳光炎	葉宇澤	柯金春	梁玉明	鎮文
二十丁	一十末	一十末	五十丁	一十末	二十末	五十丁	五十丁	二十末	一十末	五十丁	二十末	一十末	一十末	四十末	一十末	五十丁	四十丁	一十末	十五丁	二十丁	五十丁	一十末	五十丁	廿五丁

戴炳林	陳哲民	馬秀麟	歐輝	蘇醒寰	克章	蘇競寰	寒星	黃明楷	洪奇堅	丙生	和豐	梁永鉅	姚蔚生	蘇根	余炳森	盧維基	梁一平	符照慶	黃潮鐸	陳嘉深	莊瓊振	陳淑文	鄧年勝
二十丁	一十末	一十末	廿五丁	四十末	一十末	二十末	五十丁	二十末	一十末	十五丁	二十末	一十末	一十末	廿五丁	一十末	一十末	廿五丁	二十丁	十五丁	一十丁	三十丁	二十丁	二十丁

葉羨康	林奕商	斯璧	蘇澤	王文安	林猷榜	平民	陳迅	劉如珠	戴良嗣	馬聳霞	梁惠珍	協成	余斯榕	蔡述深	彭卓英	徐義盛	林長餘	廖炳森	高眼睛	盧光宗	羅林水	吳素華	克輝
一十末	二十丁	五十丁	一十末	廿五丁	廿五丁	一十末	一十末	一十末	一十末	一十末	一十末	三十末	五十丁	五十丁	五十丁	一十末	五十丁	十五丁	十五丁	三十丁	五十丁	一十末	三十丁

盧光河	鍾良芳	潘隆亨	周勤亮	金紹葉	曾鎮才	許樹勳	成放	姚族士	馬秀卿	劉惠先	方少居	候逸雯	清合	趙一虹	許敦竹	馬聳斌	童建中	陳邦太	胡鵬	許敬信	林立民	潘木榮	詹德礎
一十末	一十末	二十丁	七十丁	一十末	一十末	五十丁	一十末	一十丁	一十末	二十末	一十末	一十末	一十末	五十丁	十五丁	一十末	廿五丁	十五丁	二十丁	一十丁	一十丁	廿五丁	二十丁

寶隆	二十末	志昌	二十末	泰興	五十丁	陳光盛	一十末	博興	一十末	元泰	二十末	張自若	五十丁	然然	一十末	怡成	四十末	黃鶯飛	二十末	鴻源	一十末	順合	一十末	林再陽	一十末	懷順	一十末	隆發	一十末	仁記興	二十末	永豐	二十末	合泰	一十末	源香	一十末	再美	二十末	命達	二十丁
----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----

吳青輝	五十丁	裕合發	一十末	謝華	五十丁	永隆	一十末	和合發	二十末	劉卓榮	五十丁	亞星	二十末	泰盛	二十末	劉卓如	廿五丁	裕興	二十末	林峰榮	一十末	黃健青	一十末	成泉	二十末	潮源	一十末	振發	一十末	永發	二十末	元發	一十末	馬興利	二十末	榮興	二十末	成和	三十末	馬清松	二十丁
-----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	-----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----

馬純乙	二十末	連振明	一十末	魯	二十末	兩順	二十末	蔡茂豐	五十丁	謝梅生	一十末	正合發	二十末	朱南宏	五十丁	焯光	一十末	永泰	二十末	馮雲輝	一十末	美香	一十末	廣興	一十末	胡坤林	五十丁	聖謙	二十末	勤成	二十末	利生	一十末	永源	一十末	木河	一十末	景源	二十丁	周奕彝	廿五丁
-----	-----	-----	-----	---	-----	----	-----	-----	-----	-----	-----	-----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----

謝鵬	二十末	信昌	二十末	萬豐	一十末	張再安	一十末	春泰	二十末	玉興	二十末	林錫溪	五十丁	慶生堂	一十末	和合	一十末	馮漢榮	一十末	浙成	二十末	松泉	四十末	陳哲雄	七十五丁	育成	五十丁	符國平	一十末	元裕	一十末	永興	一十末	金記	一十末	清河	一十末	馮國英	五十丁	陳其武	二十丁
----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	-----	-----	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	-----	------	----	-----	-----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	----	-----	-----	-----	-----	-----

茲將捐助『東方使者』及『希望者社』姓名及數目列下：

鴻成泰	二十末	陳克	一十末	黃羣濃	一十末	許益泰	十五末
林深	一十末	張和盛	一十末	許明初	三十末	芳茂	一十末
吳錦昌	一十末	黃兩文	二十末	許方斌	一十末	黃和興	卅五丁
隆裕祥	四十末	仲逸	一十末	賴石軒	一十末	呂保珊	五十末
陳廣蒙	五十丁	顧士根	一十末	佳成昌	五十末	林琳	一十末
劉浪濱	二十末	同濟堂	五十末	冰虹	一十末	高則堯	五十丁
廣盛	四十末	李關	二十末	詹昭京	四十末	同興	五十末
浩士	三十末	張天祥	二十末	中澄興	五十末	胡傑	一十末
黃克南	一十末	勝合發	五十末	陳惠英	一十末	林健	二十末
黎湘	五十末	秦志華	二十末	潘劍揮	一十末	豐發	四十末
瑞蘭	一十末	廖烈英	三十末	益華	二十末	王逸民	一十末
趙雲臣	二十末	亞興	五十末	潘利生	一十末	連絲	二十末
金泰隆	五十末	許霖堅	一十末	郭鎮榮	五十丁	翁家園	四十末
張裕太豐	一十末	潘其炳	一十末	新成	三十末	胡逢俊	一十末
劉脩	二十末	國光	二十末	羅海青春	一十末	蔡興	二十末
展興	十五末	羅開悅	一十末	劉勤	二十末	呂咪	五十末
林影生	一十末	陳魂	一十末	余維勳	三十末	陳森發	一十末
鄭添順	二十末	林劍鴻	三十末	黃進記	一十末	翁宣	二十末

鳴謝暹羅的僑胞們

抗戰爆發之後，中國世界語者馬上站在國際宣傳的崗位上，本着世界語創造者柴門霍夫博士 (D-ro Zamenhof) 愛和平正義的傳統，使用着爲和平而產生爲和平而服役的世界語，參加全面抗戰的工作。所以兩年來，我們出版了世界語刊物『遠東使者』，在極度的經濟困頓之下還繼續苦幹着。

我國的抗戰，不止是爲了本身的自由解放，而且是爲了維護世界的正義和平。我們爲了把我國抗戰的意義與情勢告訴給全世界，爲了要把敵人的野蠻行爲暴露給全世界，所以我們以艱苦的精神，努力把我們的什誌出版下去。此外我們還把中國的學術和文學介紹給全世界，使世界上的進步人士知道我們中國是一個具有數千年文化的國度，並不像敵人所宣傳的那樣野蠻的未開化的民族，以增強世界人士付予我們抗戰的同情與援助。

兩年來，我們所做工作的結果，經常收受到各國世界語個人或團體的函件，對於我們大大地表示同情與讚許。這是抗戰以來，我國給予世界人士的良好印象之一。尤其是多蒙各國著名報紙什誌把我們刊物的文字，翻譯成各國的語文刊登出來；這樣我們的刊物，不啻是擁有數百萬的讀者了。不久之前我們發行的世界語單行本如『田中摺奏』，『魯迅小說選集』，『新的任務』(是我國抗戰小說集)等等博得世界各世界語刊物的大大的推荐與佳評。使我們益發感到這個工作的需要！

這次得到暹羅僑胞們捐給我們與『希望者社』的許多款項，確實地給予我們大大的興奮！我們將不知用什麼話來說出這興奮與感激！親愛的暹羅僑胞們！我們是同志了！我們是站在國際宣傳的崗位上參加全面抗戰工作的同志了！同志們，携起手來啊！

**HĀNS
CHRISTIAN
ANDERSEN**

Liaj vivo kaj verkoj
Verkis

CHR. HEILSKOV

63 paĝoj, ilustrite
1 ŝ. 8 p.

Mendu ĉe s-ino Gerda
Drotten

Bjerringbro, Danujo.

**INTERESA,
LEGINDA,
VALORA.**

Lastjara serio de

**ORIENTA
KURIERO**

370 paĝoj
5 resp. kuponoj.

Havebla ĉe niaj perantoj
aŭ ĉe la redakcio.

JUS APERIS!

JUS APERIS!

NOVA TASKO

NOVELOJ

Elĉinigis

CICIO MAR

80 paĝoj, ilustrite

1 ŝ. 8 p., inkluzive afrankon

Nova tasko enhavas novelojn, respegulantaj la spiriton, kaj batalemon de ĉinaj verkistoj kaj la suferon de ĉina popolo.

Nova tasko estas interesa legaĵo kaj meritas lokon sur ĉies librobreto.

PRINTED BY
THE NEWSPAPER ENTERPRISE LTD.,
HONG KONG.

